

1975 julio – aŭgusto

68-a jaro

n-ro 835-6 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La ĝenerala direktoro de Unesko
mesaĝas al la jubilea 60a UK

Vi trovos

ke ĉi tiu "feria" numero de la revuo enhavas plurajn kontribuojn, kiuj postulas tre seriozan pristudon kaj kelkfoje pli ol simplan informcelan tra-legon. Estas ja tiel, ke la novaĵoj kaj problemoj okazas kaj aperas tute kaprice, sen ajnaj konsideroj pri la efektivaj bezonoj de la redaktoroj. Foje estas tiel, ke en unu monato okazas tiom da gravaj aferoj, ke eblus verki pri ili dek ĉef-artikolojn; alian fojon, male, apenaŭ okazis io raportinda kaj oni el negravaĵo devas perforte krei ĉefartikolon. Tamen, ĉi-foje ni staris antaŭ la unua dilemo — estis tro da gravaj novaĵoj.

Cetere, ni preskaŭ firme decidis ne plu uzi ĉi tiun spacon en la revuo por redaktoraj meditoj, sed meti sur ĉi tiun lokon iun tute senkulpan foton. Fervoraj legantoj de la hispana periodaĵo "Boletin" scias, ke al nia rezigno pri plua meditado ĉi-loke grandioze kontribuis s-ro F. de Diego, kiu en sia rubriko "Revuo de revuoj" en "Boletin" ĉiun nian vorton komentas almenaŭ deklinie. Verdire, ofte estas tiel, ke nia redaktoro tute ne scias, kion li volis diri, antaŭ ol aperas la sekvanta numero de "Boletin", en kiu s-ro de Diego afable klarigas al ni, kion ni fakte celis diri kaj kion ni finfine diris. Dankon pro tiu bonkora maldormo super la sorto, ne nur de nia revuo sed de la tuta UEA, kies membro s-ro de Diego ne estas dum la lastaj tri jaroj. Dankon ankaŭ pro la senpaga reklamado de nia redaktoro, kies nomo dum la lasta duonjaro pli ofte aperas en "Boletin" ol en nia revuo.

Enhavo

- 121 Mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko okaze de la Internacia Jaro de de la Virino: La celo — kompleta egaleco
- 122 Mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko al la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago: Daŭrigi sur esence grava kampo
- 123 Danĝera ludo en Sarlando (S. Milojević)
- 125 Pri la trijara eksperimenta instruado de Esperanto: La Internacia Lingvo por internaciisma eduko (d-ro Peter Zlatnar)
- 127 Kelkaj aspektoj de la Esperanto-movado en la azia kontinento: Azio al azianoj (d-ro R. Corsetti)
- 130 Leterkesto
- 131 Recenzoj (Japanaj verkoj pri Esperanto, "Etnografiaj donitaĵoj")
- 133 Enciklopedio: Pazigrafioj (Detlev Blanke)
- 135 Rememorigoj por konsidero (Hans Bakker)
- 136 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 138 Esperanto en radio
- 139 Oficiala informilo
- 140 Anoncetoj

La kovrilo

Dudek jarojn post la fama Rezolucio de Montevideo, unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj, la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou-Mahtar M' Bow (sur la kovrila foto) sendis personan mesaĝon al la 60a Universal Kongreso de Esperanto en Kopenhago. La alveno de tiu mesaĝo de la ĉefa funkciulo de la monda organizaĵo kun kiu UEA estas en konsultaj rilatoj sendube estas signo de aparta favoro kaj kunlaboremo. Grandparte dependas de la estonta agado de UEA kiomgrade restos prestiĝa la nomparto de la Asocio "en konsultaj rilatoj kun Unesko". Ju pli la Asocio partoprenos la programojn de Unesko, des pli Unesko proksimiĝos al la specifaj demandoj, kiujn kun ĝi volus plutrakti ne nur UEA sed la tuta monda esperantistaro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.


Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.



MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO OKAZE DE LA INTERNACIA JARO DE LA VIRINO:


La celo – kompleta egaleco

La Internacia Jaro de la Virino trovis lokon ne nur en la aktuala agadprogramo de la organoj de Universala Esperanto-Asocio (formiĝo de aparta internacia kunordiga komitato, reprezentiĝo en la monda konferenco en Meksikio ktp.), sed ĝi eniris ankaŭ la planojn de la jara aktiveco de pluraj landaj asocioj de UEA kaj de multaj regionaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj tra la tuta mondo. Ankaŭ la ĉeftemo de la jubilea 60a Universala Kongreso en Kopenhago estas ligita al la Internacia Jaro de la Virino kaj ĝi aparte traktos la socian pozicion de la virino. Tiun temon plurrilate tuŝas ankaŭ la mesaĝo, kiun okaze de la Jaro sendis la ĝenerala direktoro de Unesko al ĉiuj ŝtatoj-membroj kaj al ĉiuj internaciaj organizaĵoj kunlaborantaj kun la monda organizaĵo por la edukado, scienco kaj kulturo.



DEKLARANTE LA JARON 1975 la Internacia Jaro de la Virino, la Unuiĝintaj Nacioj samtempe konfesis malsukceson kaj esprimis sian firman intencon efike agi por plibonigi la pozicion de la virinoj. Malsukceso, ĉar spite al lastatempaj avancoj en la kampo de la homaj rajtoj, ankoraŭ ekzistas granda fendo inter la teorio kaj la praktiko; firma intenco, ĉar estas nun agnoskate, ke streĉoj por la evoluo kaj paco ne povos sukcesi, se la virinoj ne estas plene integritaj kun ili.

La celo estas klara: kompleta egaleco inter la viroj kaj la virinoj. Por atingi tion, ni devos rekte alfronti komplikajn problemojn. Unesko mem, kiu estas plene dediĉita al tiu ĉi celo, devas konstante plivastigi siajn aktivecojn por elteni la defion. Ĝiaj unuaj programoj por ebligi egalan alireblecon de junulinoj al la edukado lanĉiĝis antaŭ deko da jaroj, sed ĝi lernis per la sperto, ke tio ne estas sufiĉa. Egala alirebleco ne garantiis egalan ŝancon, ĉu en edukado ĉu en dungigo. Nek ĝi tuŝis la fundamentan problemon de la virina analfabeteco, nek malpliigis la malbonstaton de la kamparaj virinoj. Ĝi ankaŭ ne ŝanĝis la tradician bildon de la virinoj, respeguliĝantan en la amaskomunikiloj kaj eĉ en lernolibroj.



La tasko estas timiga, kiel montras la ciferoj. El la taksataj 800 milionoj da analfabetoj en la mondo, 500 milionoj estas virinoj. Kvankam virinoj konsistigas kvanton inter unu triono kaj unu duono de la laborrimedoj, la grandega plimulto koncentriĝas en malaltalajraj postenoj.

Adekvata repliko al tiu ĉi defio postulos gigantan edukstrebado, celantan precipe la ŝanĝadon de vidpunktoj — speciale la vidpunktoj de viroj koncerne virinojn. La fremdigo de virinoj for de tiel granda parto de la socio devas ĉesi, ilia rolo devas perdi sian mistifikon. Ni devas labori por atingi profundajn ŝanĝojn en la strukturo kaj enhavo de la edukado, klopodi forviŝi analfabetecon unu fojon por ĉiam, vastigi la eblecon de plenaĝa edukigo, jungi la potencon de la amaskomunikiloj por atingi niajn celojn.



Ni devas kanalogi ĉiujn rimedojn de la "lerna socio" por prepari la virinojn ne nur al egaleco sed ankaŭ al gvidaj roloj, por pligrandigi ilian kontribuon al la bonfarto de iliaj familioj kaj la progreso de la socioj al kiuj ili apartenas. Nur tiam kiam virinoj plene partoprenos en la evoluigo kaj en la decidofara procezo, ni estos certaj pri vera progreso en la kampo de homaj rajtoj kaj forigo de la baroj inter individuoj kaj nacioj. En tiu ĉi senco la plej lasta sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko unuanime bonvenigis la Internacian Jaron de la Virino kiel komencan punkton por vigla longdaŭra programo de integrita agado en la edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Mi ĵuras, ke Unesko dediĉos ĉiujn rimedojn je sia dispono al tiu ĉi kunordigita agado. Mi apelacias al registaroj, al internaciaj organizaĵoj kaj al individuaj viroj kaj virinoj aliĝi al la komuna klopodo, ĉar sen ilia subteno ni povos nenion

atingi. Krom se ni faros tiun komunan kampanjon, ni riskos kondamni duonon de la homa raso al samloka paŝado dum la antaŭeniro de la homaro. Sed, se ni kune agos, ni povos esti certaj, ke niaj atingoj dum la Internacia Jaro de la Virino kaj en la estonteco profitigos ne nur la virinojn, sed ankaŭ la tutan homaron.

Amadou-Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro de Unesko

MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO AL LA 60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN KOPENHAGO

Daŭrigi sur esence grava kampo

Dezirante daŭrigi kaj intensigi sian lukton kontraŭ ĉiuj formoj de malegaleco kaj diskriminacio, kaj konsciante pri la kontribuo, kiun la virinoj povas alporti al la progreso kaj harmonia evoluo de la socio, Unesko bonvenigas ĉiujn iniciatojn faritajn en la sfero de ĝia kompetento por helpi la progresigon de la virinaj rajtoj.

Tial mi estas feliĉa, ke la organizantoj de la 60a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉefan temon de ĉi tiu manifestacio la rolon de la virino en la socio. Per la kontribuo, kiun ili celas tiamaniere fari al la celebrado de la Internacia Jaro de la Virino — proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj —, la esperantistoj povos daŭrigi sur esence grava kampo la laboron, kiun ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj.

Kun aparta fervoro, do, mi direktas al ĉiuj partoprenantoj miajn plej varmajn bondezirojn por la sukceso de iliaj laboroj.

Amadou-Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro de la Organizaĵo de
Unuiĝintaj Nacioj por la Edukado, Scienco kaj
Kulturo (Unesko)

Danĝera ludo en Sarlando


Ĉiu provo ludi per la unueco de la neŭtrala internacia Esperanto-movado estas danĝera kaj tial ankaŭ kondamninda. Al tia starpunkto de nia revuo ŝuldiĝas la fakto, ke ni ĉi tie amplekse traktas privatan aranĝon, kies celo estas disspliti la neŭtralan internacian Esperanto-movadon.

SEPDEK JAROJN post la Unua Universala Kongreso de la neŭtrala internacia Esperanto-movado kaj 67 jarojn post la organiziĝo de tiu neŭtrala movado en Universala Esperanto-Asocio — preskaŭ samtempe kun la jubilea 60a UK en Kopenhago —, la anonima organizaĵo Sarlanda Esperanto-Ligo (Dudweiler, Sarlando, FR Germanio) anoncas la okazigon de "Unua internacia konferenco de la neŭtrala Esperanto-movado" (Saarbrücken, FR Germanio, 1975 08 10 — 08 17). Ĉar temas pri senprecedenca provo falsigi la tutan ĝisnunan historion de la neŭtrala Esperanto-movado kaj de UEA en ĝi, ni klopodu ekzameni la anoncitajn detalojn de tiu absurda kaj danĝera aranĝo.

La unuan cirkuleron pri la konferenco ni ricevis la 14an de majo. Estis malfrue por menciigi ĝin en la maja numero de nia revuo, kaj ni ne faris tion ankaŭ en la junia numero, ĉar ni simple bezonis iom da tempo por orientiĝi kaj komenci kredi, ke la tuto ne estas nur ia surrealisma ŝerco. Tiu cirkulero komenciĝas jene: "Ekde la momento, kiam la eventoj ligitaj kun la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo (1974) tranĉis la kontinuan de la neŭtrala Esperanto-movado, Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) celis kontribui al la forigo de tiu malbono. . . Post intensaj interparoloj kun diversaj aktivuloj en kaj kun apogantoj de la ĝishamburga UEA kaj post funda analizo de la posthamburga situacio de UEA, ni decidis aranĝi Internacian Esperanto-Konferencon. . .". La cirkulero plue informas, ke la eksprezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, "konsentis fari la enkondukan prelegon kaj partopreni en la laboroj de la tuta konferenco". Krom prof. Lapenna, en Saarbrücken prelegos, interalie, ankaŭ jenaj ges-roj: André Bourdeaux, Günther Becker, Jean Thierry, Helmut Sonnabend kaj Marianne Vermaas.

Sarlanda Esperanto-Ligo estas facila kazo, des pli, ke SEL en la menciita cirkulero konfesas, ke ĝi nur "teknike prizorgas" la konferencon. Oni do povus lasi tiun SEL, ke ĝi plue ternu kaj oni ne devus timi ĝiajn splitigajn paŝojn, ĉar eĉ ĝia impertinenta utiligo de la Jarlibro de UEA por dissendi cirkulerojn, kiuj instigadis al ekŝigo el UEA, havis preskaŭ nulan efikon. SEL kaptis kelkajn hamburgajn sapvezikojn kaj plumbloviĝas ilin por tiamaniere venki sian anonimecon kaj finance profiti el kelkaj homaj tragedioj, el kelkaj movadaj memmortigoj, okazintaj en ligo kun la 59a UK en Hamburgo. Cetere, SEL ĝis nun estis konata ekskluzive laŭ sia sekretario, s-ro Haupenthal, kiu eĉ pruntedonas sian privatan adreson al la organizaĵo. Estas interese noti, ke tiu s-ro Haupenthal ekŝiĝis el UEA jam en la jaro 1971, do longe antaŭ Hamburgo,

kaj sonas almenaŭ strange, ke nun ĝuste li trudiĝas kiel pacanĝelo kaj unu el la ĉefaj "defendantoj" de ia "ĝishamburga" UEA. Estus do honeste, ke li — tiu s-ro Haupenthal — ĉesu travestie ludi "amikon" de UEA, ĉar la aferoj estas klaraj: Li estis malamiko de la ĝishamburga UEA kaj li restas malamiko de la posthamburga UEA. Konate estas, ke s-ro Haupenthal kapablas labori, sed ne estas malpli konate, ke li mal-kapablas kunlabori. (Li siatempe abrupte ekŝiĝis el siaj redaktorecoj en *Esperanto en Perspektivo*, *Enciklopedio de Esperanto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*). Per la blufa kaj splitiga nomo de la aranĝo en Saarbrücken, SEL aroge uzurpas la statutajn prerogativojn de UEA, neante samtempe la tutan ĝisnunan historion de la neŭtrala internacia Esperanto-movado kaj kalumniante ĉiujn ĝisnunajn gvidantojn de tiu movado. Kion do faris d-ro Zamenhof en Bulonjo-sur-Marco en 1905, se s-ro Haupenthal aranĝas la "Unuan internacian konferencon de la neŭtrala Esperanto-movado" en Saarbrücken en 1975? Kion faris Hodler? Kion faris Privat? Kion Malmgren, Yagi, Canuto? Kion finfine faris Ivo Lapenna, se la anoncita burleskaĵo de Haupenthal estas neŭtraleca premiero?



Bulonjo-sur-Marco 1905: Post sepdek jaroj oni aroge neas ĝian neŭtralecon kaj klopodas revizii ĝian signifon.

En la julia-aŭgusta numero de *Boletín*, kiu dum la lastaj monatoj aspektas pli kiel eldonaĵo de Sarlanda Esperanto-Ligo, ol kiel revuo de Hispana Esperanto-Federacio, oni legas klarigon pri la intencoj de la aranĝo en Saarbrücken: "La neŭtralaj esperantistoj bonvenigas tiun decidon de niaj germanaj samideanoj kun ĝojo kaj danko ĉar, de nun, ili denove povos — internacie organizitaj — labori por kaj per Esperanto en la solvo de la monda lingvo-problemo laŭ praktikaj metodoj bezonataj de la moderna vivo, sed ankaŭ laŭ

la spirito de Dro. Zamenhof; tio estas, neŭtrale kaj demokrate, nepre kondiĉo por homa kunfratiĝo." Oni en tiu numero de *Boletín* bedaŭras, ke la konferenco ĉi-jare estis anoncita tro malfrue kaj oni invitas al aliĝo kaj diskonigo de la aranĝo, kiu do celas fariĝi tradicia kaj kiu do donas ŝancon "organizigi" al tiuj, kiuj ignoras kaj volas detrui la ekzistantajn formojn de la neŭtrala Esperanto-movado. Efektive, estas jam tempo, ke la gvidantaro de Hispana Esperanto-Federacio decidiĝu ĉu ĝi eble volas ekŝiĝi el UEA kaj aliĝi al Sarlanda Esperanto-Ligo, ĉar estas absurde, ke la gvidantaro de tiu aliĝinta landa asocio de UEA en sia revuo dediĉas 10 liniojn al la jubilea 60a UK, dum la skismiga perfidaĵo de s-ro Haupenthal & Ko. okupas sepoble tioman spacon.



La elektokomisiono en Hamburgo (Wells, Vermaas, Aleksiev): Malvenkintoj kontestas la regulecon de la elektoj.

Unu jaron post la Hamburga Kongreso kaj jaron kaj duono post la aprila ĉefartikolo de la eksprezidanto de UEA en nia revuo, oni ankoraŭ blufas pri ekzisto de "fidindaj dokumentoj" pri onidira "komploto" en Hamburgo. Estas jam delonge tempo, ke oni ĉesu blufi kaj misgvidi la honestajn neinformitajn homojn. Sur la tablon la atutojn, se oni havas ilin! Oni ne uzu "komploton", kiun oni mem elpensis, kiel pretekston por efektive komploti kontraŭ UEA, kiu en Hamburgo nur regeneris sin per novaj kaj freŝaj laborfortoj, jam montrintaj siajn kapablon kaj laboremon.

En kio do, en kiu fakto aŭ ago, hamburga aŭ post-hamburga, manifestiĝis la onidira malneŭtraliĝo de UEA? Ĉu en tio, ke la nova Estraro en kvin monatoj sukcesis duonigi la deficiton, kiun por UEA buĝetis la ĝishamburga Estraro? Ĉu en tio, ke ĉi tiu jaro finiĝos kun minimuma defcito aŭ eĉ kun pli pozitiva surprizo? Ĉu en tio, ke la aliĝo al la Societo Zamenhof superis ĉiujn prognozojn, ke la donacoj, esprimantaj fidon al la Asocio, estas nun preskaŭ trioble pli altaj, ol en la sama periodo pasintjare? Ĉu la malneŭtraliĝo de UEA estas pruvebla per la fakto, ke oni nun havas kongresurbojn por 1976 kaj 1977, dum la antaŭa Estraro venis al Hamburgo sen kongresurbo por 1975? Ĉu la neŭtraleco de UEA estas endanĝerigita per la fakto, ke la dekumita oficistaro de la Centra Oficejo faras superhomajn streĉojn por plenumi la saman laboron kiel antaŭe? Ĉu la pliintensigo de la rilatoj kun Unesko kaj UN estas ĝena rilate la neŭtralecon de la Asocio?

La opoziciantoj de UEA imputas al la nuna gvidantaro de la Asocio aferojn, pri kiuj opoziciantoj (iuj el ili) mem devus respondi, se entute necesas, ke iu respondecu. Oni false prezentas iun internan dokumenton de Bulgara Esperantista Asocio — el la jaro 1972! — kiel freŝdatan dokumenton pri neneŭtraleco de ĉi tiu landa asocio de UEA. En sia antaŭ nelonge distribuita deklaro, la bulgara asocio demandas, ĉu oni nun revivigas tiun malnoviĝintan dokumenton nur pro la fakto, ke la bulgaraj komitatanoj en Hamburgo ne subtenis la antaŭan gvidantaron de UEA.

La neŭtraleco de UEA estas kodigita en la Statuto de la Asocio, ĝi estas rekonfirmita en aparta rezolucio de la 59a UK kaj ĝi estas nun observata pli strikte, ol antaŭ Hamburgo, eble ĝuste pro la senbazaj kritikoj kaj elfabritaj kalumnioj. Necesas kompreni, ke la vera bastiono de tiu neŭtraleco neniam estis unu sola homo, sed la tuta membraro de la Asocio. Oni do ĉesu pri si mem elpensadi epitetojn de tia speco, ĉar la formulo "Neŭtraleco — tio estas mi!" estas almenaŭ tiom ridinda kaj absurda, kiom tia estis siatempe la deklaro de Ludoviko la Dekkvara "La ŝtato — tio estas mi!".

Klopodante identigi la kernon de la posthamburgaj kritikoj, kiuj iras al la adreso de UEA, kun iom da objektivemo oni facile konstatas, ke fakte ne temas pri la neŭtraleco aŭ malneŭtraleco de la monda organizaĵo. Temas, male, pri unuaranga ekzemplo de subjektiveco, pri klara partiececo, malneŭtraleco kaj potenckmanio de la kritikantoj.

Anstataŭ demokrate akcepti la demokratajn rezultojn de la pasintjaraj elektoj en Hamburgo — okazintaj laŭ la valida Statuto, kiun cetere ellaboris kaj finpoluris la antaŭaj gvidantoj de UEA —, la kritikantoj de la nuna gvidantaro, sub la etikedo de "neŭtraleco" propagandas fakte obskuran makartismon kaj revivigas la fantomojn de la "malvarma milito", forgesante, ke la Esperanto-movado — pri tio ĝi povas fieri! — neniam estis bona grundo por semi tiajn ideojn, kiuj havas nenion komunan kun la internaciismo kaj proksimigo de la homoj kaj popoloj, kaj kiuj tial estas kontraŭaj ankaŭ al la bazaj principoj de la Esperanto-movado kaj al la Statuto de Universala Esperanto-Asocio. Oni ja povas krei kiom ajn laŭte oni volas, oni povas misprezenti aferojn kaj misgvidi homojn, sed oni ne forgesu, ke ne eblas perforti la historion, ĉar, oni ne ĉeestos kiam ĝi estos skribata. Prefere, oni klopodu savi de sia digno tion, kio ankoraŭ estas savebla.

Ĉi-jare, kiam la ĝenerala direktoro de Unesko unuafoje sendas sian personan mesaĝon al la 60a Universala Kongreso de Esperanto, prof. d-ro Ivo Lapenna devus konscii, ke la ĝusta loko por la Heroo de Montevideo ne estas Sarlando, sed Kopenhago. Tie en Kopenhago, ĝuste li, prof. d-ro Ivo Lapenna, estus la plej taŭga persono sub ĉi tiu firmamento por laŭtleĝi tiun mesaĝon de Unesko al la impona reprezentantaro de la tutmonda neŭtrala Esperanto-movado.

Simo Milojević



PRI LA TRIJARA EKSPERIMENTA INSTRUADO DE ESPERANTO:

La Internacia Lingvo por internaciisma edukado

Sendube, la plej serioza laboro, kiun oni ĝis nun faris sur la kampo de la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, estas tiu okazanta ĉirkaŭ la jam tradicia kaj renoma Kunordiga Konferenco en Maribor. Tiu konferenco jam dum preskaŭ tuta jardeko estas la plej aŭtoritata movada forumo pri la lerneja agado. Ĝia aparta trajto estas la fakto, ke ĝi okupiĝas ne malpli pri praktikaj, ol pri teoriaj demandoj ligitaj al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Kvankam ni jam antaŭ unu jaro klopodis varbi kompetentan artikolon pri la nuna stato de la lerneja eksperimento, kiu dum pluraj jaroj estis ankaŭ la ĉeftemo de la Konferenco en Maribor, montriĝis, ke ni estis aparte malbonŝancaj tiurilate. Feliĉe, d-ro Peter Zlatnar, la vera patro de la maribora fenomeno, komence de ĉi tiu jaro verkis ĉi tiun artikolon por la prestiĝa slovena revuo "Naši razgledi".

LAŬ INICIATO de la esperantistaj organizaĵoj en Slovenio kaj en la tuta Jugoslavio, subtenata de socipolitikaj organoj kaj en kunlaboro kun la Pedagogia Instituto ĉe la Universitato de Ljubljana, la Instituto por Lernejoj de SR Slovenio organizis kaj gvidis trijaran eksperimentan instruadon de Esperanto en kvar lernejoj (de la 4a ĝis la 6a klasoj). Temas pri la lernejoj: "Tone Ĉufar" kaj "Slava Klavora" en Maribor, "Vencel Perko" en Domjale kaj Elementa lernejo en Sečovle. Per tio ĉi Slovenio aliĝis, kune kun Kroatio kaj Serbio, al internacia provo enkonduki Esperanton en la elementajn lernejojn. En la eksperimento kunlaboras ankoraŭ 5 lernejoj el Italio, 10 lernejoj el Hungario kaj 2 lernejoj el Bulgario. Fake la eksperimenton gvidas d-ro Istvan Szerdahelyi, profesoro pri la Esperantaj lingvo kaj literaturo en la Scienca Universitato de Budapeŝto.

El la analiza raporto pri la rezultoj de la testado en la fino de la dua eksperimenta jaro ni konstatas, ke la lernantoj de elementa lernejo povas pli rapide kaj pli facile ellerni Esperanton, ol kiun ajn alian lingvon. La

rezultoj de Esperanto-lingvoscio de lernantoj el kvin lingvaj regionoj, en la kvar menciitaj ŝtatoj, estas esprimataj per sukceskoefficiento, montranta la kvanton da studhoroj, la aĝon de gelernantoj kaj la proporcion de ĝustaj kaj malĝustaj solvoj de la testoj. El la indicoj evidentiĝas, ke la koefficiento de sukceso pri vortoscio en Esperanto estas 178,8, kompare kun 116,9 en la angla lingvo, 101,9 en la itala, 79,0 en la germana kaj 74,8 en la rusa. Kiam temas pri la esprimkapablo, en Esperanto la koefficiento estas 136, en la rusa 88, en la angla 74, en la itala 69 kaj en la germana 68. La fina testado estos farita post la tria lernoĵaro. Inter la hipotezoj, kiujn starigas la internacia eksperimento, estas interesaj la jenaj:

- 1) La lernantoj de elementa lernejo pli rapide kaj pli facile ellernas Esperanton, ol iun ajn alian lingvon.
- 2) Ĉu la lernanto de elementa lernejo interesiĝas pri la Internacia Lingvo?
- 3) Ĉu la scio de Esperanto helpas al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj?
- 4) Ĉu la scio de Esperanto formas kaj pliprofundigas ĉe la lernantoj la humanismon, internaciismon, internacian solidarecon kaj amikecon?

Al tiuj demandoj respondos la esploroj de prof. d-ro Szerdahelyi.

Tamen, ni jam nun povas antaŭvidi la respondojn surbaze de anonima enketo, farita inter la slovenaj gelernantoj kaj inter tiuj gelernantoj el aliaj landoj, kiuj pasintjare partoprenis la Internacian Tendaran Lernejon en Primošten (Jugoslavio). La plej granda parto de la respondoj de la enketitaj gelernantoj evidencigas pozitivajn reagojn al la supraj hipotezaj demandoj: Kun intereso lernis Esperanton 77 procentoj de la demanditoj kaj 74 procentoj el inter ili volas daŭrigi ĝian studadon; 94 procentoj deklaris, ke la lingvo estas interesa, 60 procentoj opinias, ke Esperanto estas facila lingvo, dum 71,5 procentoj opinias, ke la lernado de Esperanto pozitive influas la lernadon de alia fremda lingvo.

La enhavo de la respondoj donitaj al la demandoj 1 kaj 2 montras pligrandiĝintan intereson pri reciproka interkonatiĝo, pri homa interkompreniĝo de diversnacieco, pri amikeco inter la popoloj. La respondoj al la demando 4 esprimas same aktivan sintenon de la gelernantoj al la internacia kunvivado kaj amikeco. Tion praktike pruvis ankaŭ la renkontiĝo en Primošten de gelernantoj, partoprenintaj la trijaran eksperimenton. Tie evidentiĝis, ke post la trijara lernado de Esperanto en siaj lernejoj, la lernantoj nun povis libere konversacii, ili kapablis skribi siajn taskojn kaj verki artikolojn por siaj gazetetoj, ili kune preparadis kultur-artajn programojn, liberanime amuziĝis, interkonatiĝis, amikiĝis kaj, ne laste, dume ili partoprenis en la instruado laŭ aparta internacia programo.

La lernantoj kun plezuro sekvis la diversajn instruotemojn, kiel tio evidentiĝis en alia postkursa enketo, kaj, la plej altan poenton ili donis ĝuste al la internaciaj socipolitikaj temoj: UN, Unesko, UNICEF, FAO,



la Ruĝa Kruco, la Sepa Kontinento kaj la Esperantomovado gajnis 119 poentojn, dum la ĝeneralaj klerigaj temoj (geografio, literaturo, muziko) atingis 112, kulturamuzaj temoj (kantado, sporto) ricevis 96, kaj la lingvoperfektigaj temoj (konversacio, Esperantaj poezio kaj prozo) gajnis 94 poentojn. En la enketo, la lernantoj aparte akcentis sian kontenton pri tio, ke ili havis okazon partopreni la instruadon en internaciaj klasoj kaj bone kompreni la diversnaciajn instruistojn. La Internacia Tendara Lernejo estis ekzemplo de ideo direktita instruado en elementa lernejo kun diversnaciaj infanoj kaj en nediskriminacia lingvo kun harmonie kunordigitaj tendencoj en ĉiu direkto.

La partoprenintaj instruistoj konkludis, ke oni devas eviti ĉiun naciisman koloron dum la prezentado de iu temo kaj strikte konservi la maksimuman objektivon, ĉiam priatentante la ĝeneralan humanisman karakteron de la scienco al kiu kontribuis ĉiuj popoloj.

La pedagogoj konstatis, ke la lernantoj kun vigla intereso sekvis la temojn pri interhomaj rilatoj el la vidpunkto de ĝeneralaj homaj normoj por paca kunvivado inter la popoloj. Samtempe, akcentite montriĝis la bezono, ke la instruistoj estu por tiaj temoj enhave kaj metodike bone preparitaj.

Evidentiĝis, ke estus necesbezone priesplori la tipon de tia lernejo en plurlingvaj regionoj, kie vivas etnaj minoritatoj kaj gastlaboristoj, tiel, ke oni aparte instruonaciajn lingvojn, kaj en Esperanto la temojn de la ĝenerala eduka karaktero.

D-ro Peter Zlatnar

Azio al azianoj

Unu el la plej karakterizaj trajtoj de la nuntempa gvidmaniero en UEA estas la ekzisto de apartaj komitatoj aŭ estraraj komisionoj preskaŭ por ĉiu kampo de la asocia agado. Formi tiujn komisionojn estis nek malfacila nek aparte nova iniciato, tio kio mirigas estas la fakto, ke preskaŭ ĉiuj komisionoj funkcias kaj efektive stude aliras la problemaron de UEA. Inter la plej aktivaj komisionoj estas tiu pri la landaj asocioj kaj regiona agado. D-ro Renato Corsetti, komisiito pri la agado en la landoj sen organizita Movado, ĉi tie traktas kelkajn aspektojn de la agado en Azio, ĉefe tamen en tri landoj, kiuj havas landajn Esperanto-organizaĵojn.

ŜAJNAS AL MI, ke la problemo "Azio" ne povas esti solvita el la vidpunkto de la Esperanto-movado, se ni ne solvas unue la problemojn "Ĉinio", "Japanio" kaj "Vjetnamio".

Fakte ja UEA havas la centran respondecon pri disvastigado de la Internacia Lingvo en ĉiuj mondopartoj, sed oni ne rajtas pretervidi, ke pro historiaj kaj aliaj kialoj ĝi agadis kaj plukapablas efike agi ĉefe en Eŭropo. Sekve, ĝi devas necese apogi sin je la aziaj esperantistoj por progresigi la Internacian Lingvon en Azio. Ili pli bone ol ni konas la lokajn sociajn kaj politikajn kondiĉojn, ili konas la lokajn lingvojn, ili povas pli facile ol ni vojaĝi al landoj por ili najbaraj.

Bonŝance, malkiel en Afriko, en Azio estas kelkaj fortaj landaj movadoj, kaj ili, laŭ mia opinio, konsistigas nian plej valoran atuton. Temas ĉefe pri la ĉina, japana kaj vjetnama movadoj. Ni preterlasu nun la relative fortan sudkorean movadon pro la tute apartaj politikaj kondiĉoj de tiu lando en la nuna periodo. Tamen, antaŭkondiĉo por fari ion ajn estas kunlaborado inter UEA kaj aziaj esperantistoj, kaj la deziro de ĉi-lastaj esti portantoj de la Internacia Lingvo ankaŭ al aliaj aziaj landoj, kie ĝis nun ekzistas nur kelkaj izoluloj aŭ plej ofte nur dezerto.

Ni pritraktu nun la tri supremenciitajn "problemojn" unuope.

Ĉinio

Ĉiu meze bona esperantisto certe scias ion pri la movado en Ĉinio. La gazeto *El Popola Ĉinio* estas trovebla en ĉiu Esperanto-klubo tra la mondo kaj ĝi estas sendube unu el la plej bone farataj gazetoj en la Internacia Lingvo. Ankaŭ kiel eldonisto de libroj Ĉinio ĝuas famon pro la kutime tre alta nivelo de la lingvo kaj pro la enhavo, kiu estas ofte interesa ankaŭ por homoj kun malsamaj mondkonceptoj. Kun tiu ĉi granda kaj meritoplena peresperanta agado ne kuniras, tamen, samnivela poresperanta agado, kaj ligoj kun UEA apenaŭ ekzistas.

La principoj de la agado de Ĉina Esperanto-Ligo estis substrekitaj en la jena deklaro de la jaro 1968: "... ekzistente disde la liberiga lukto por la venko de socialismo tra la tuta mondo, Esperanto ne havas perspektivon."

Tamen, mi tre obstine opinias, ke ĈEL devus reekzameni tiun sian pozicion rilate al UEA kaj entute rilate la poresperantan agadon, ĉar la batalo por la Internacia Lingvo estas samtempe batalo por la progreso kaj la liberiĝo de la homaro en la kultura kampo.

Kiam UEA batalas kontraŭ lingva diskriminacio, kontraŭ potenccela uzado de grandaj lingvoj en internaciaj rilatoj, kontraŭ subpremado de malplimultaj



Pekino (Kultura Palaco de Nacioj): Ĉu la ĉina rilato al la Internacia Lingvo estas paradoksa?

etnoj, tiam UEA senpere ligas la strebadojn por Esperanto kun la strebado de subpremado al libero. Pro tio mi ne vidas kialojn por la nekunlaborado inter UEA kaj ĈEL. Cetere, post la aliĝo de Ĉinio al multaj internaciaj organizaĵoj (de UN ĝis Unesko), estas malfacile argumentebla la rifuzo aliĝi al UEA, kiu respektas la bazajn principojn de tiuj mondaj organizaĵoj. Aliflanke, sen Ĉinio UEA sentas, ke parto, eĉ ne malhavebla parto, de ĝia "universaleco" estas mankanta. Tio finfine ne povas ne malpliigi la efikecon de la laboro por disvastigi Esperanton kaj por samtempe kaj kunlige agi kontraŭ ĉia misuzo de kulturo kaj de lingvoj por nete potencpolitikaj celoj. Kaj, ĉu Ĉina Esperanto-Ligo povas ne kunlabori sur tia bazo? Mi apenaŭ povas kredi je tio.

Japanio

Kiam okcidenteŭropaj esperantistoj legas raportojn pri la movado en Japanio, ili kutime restas ŝokitaj pro la multnombreco de la movadanoj kaj pro ilia juneco. Restas tamen neklarigita mistero, t.e. la kompare malgranda pezo, kiun japanoj havas en la internacia movado, kaj ilia nun jam "fabela" malkapablo organizi en unu tutlanda tegmenta organizaĵo.

Mi ne volas, nek mi povus, precize indiki respondecojn aŭ lanĉi akuzojn. Tamen, espereble japanoj iam ja sentos tiun neceson kaj kapablos venki la ekzistantajn malfacilaĵojn. Ni ne povas kredi, ke japanaj esperantistoj tiom multe malsuperas siajn neesperantistajn samlandanojn, kiuj kutime donas abundajn pruvojn pri organiza kapablo en ĉiuj kampoj.

Granda tutlanda demokratia organizaĵo: jen la nepra antaŭkondiĉo por unuigi japanajn esperantistojn, ekspluati ĉiujn latentajn homajn fortojn, estigi kanalon daŭre funkciantan inter la loka kaj la tutmonda esperantistaro, agi kiel motoro por aliaj aziaj landoj.

Cetere, Japanio estas en aparte bona pozicio, ĉar ĝi havas multajn ligojn kun aliaj aziaj landoj, en ĝiaj universitatoj studas multaj aziaj gejunuloj, kaj ĝia registaro, malgraŭ lastatempaj klopodoj, certe ne povas serioze esperi igi la japanan granda lingvo por internacia aŭ simple interazia uzo.

Danĝero povas kuŝi eventuale en la apogo, kiun lastatempe intelektuloj donas al la angla kiel internacia lingvo, sed mi volas kredi, ke niaj japanaj amikoj funde ekspluatos la tutan argumentan armilaron de nia movado por konvinki ilin pri ilia misjuĝado de la situacio. Tamen, ankaŭ tiuspeca konvinkado postulas trafajn dokumentojn, organizitan dissendadon, kunlaboradon tutlandan, unuvorte organizaĵon, kiu kapablas mobilizi ĉiujn mobilizeblajn fortojn.


Kaj, kion opinias niaj japanaj kunbatalantoj pri eventuala represado, en Japanio, de ia "azia" eldono de tiu ĉi revuo, kiu tiamaniere atingus sen malfruo kaj sen aerpoŝtaj kromkostoj ĉiujn aziajn abonantojn? Ankaŭ tion anticipu adekvata organiza strukturo kaj multaj kunlaborantoj.

Vjetnamio

La rilatoj inter UEA kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) neniam estis tre varmaj, kiam temas pri oficialaj rilatoj. Ni konfesu, ke iam ili atingis eĉ glacian staton. Aliflanke, oni ne forgesu, ke la rilatoj inter parto de la monda esperantistaro kaj vjetnamaj esperantistoj dum la ĵus finiĝinta milito estis tre intensaj.

Espereble, la novaj vivkondiĉoj alportos novan sukcesan agadperiodon al VPEA en kies vicoj, supozeble, kunlaboros ankaŭ la kelkaj izoluloj ekzistantaj en la sudo de la lando.

Kun aparta ĝojo mi povis legi la deklaron de s-ro Nguyen Van Kin, prezidanto de VPEA, kiu tre klare



Japanio: Unu el la regionaj Esperanto-aranĝoj, kiuj sendube estas pruvo pri la forto de la Movado en ĉi tiu lando, sed kiuj starigas ankaŭ la demandon pri nenecesa disŝutado de la labora potencialo de la japana esperantistaro.



Vjetnamio (la pagodo Keo el la 17a jarcento): Ĉu la nova vivmaniero estos fruktodona ankaŭ por Esperanto?

diris, ke: "... en la nunaj packondiĉoj VPEA ankoraŭ pli strebos vastigi siajn amikecajn kaj kunlaborajn rilatojn kun la Esperanto-organizaĵoj kaj progresemaĵoj individuoj tra la tuta mondo. Ĝi ... pretiĝas kreskigi regulajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio surbaze de la principoj de memstareco, egaleco kaj kultura kunlaborado por la internacia lingvo."

Bone, UEA pretas kunlabori surbaze de tiuj principoj, kiujn, cetere, ĝi praktike aplikas en la rilatoj kun ĉiuj landaj asocioj.

Aliflanke, ĉu VPEA pretas transpreni sian naturan rolon de peranto de la Internacia Lingvo al la aliaj landoj de Sudorienta Azio? Apenaŭ oni povas imagi, ke UEA-funkciuloj farus tion pli efike ol VPEA-anoj. Ĉu Hanojo pretas kunvoki kaj gastigi kongreson de aziaj esperantistoj?

Esperantistoj en aliaj landoj de Azio

Se ni rigardas al aliaj aziaj landoj, ni trovas relative fortan esperantistaron en Suda Koreo, kun kelkaj tre bonaj esperantistoj, lingve kaj movade spertaj. Ili ĉiam klopodis aranĝi ankaŭ komunajn kunvenojn kun eksterlandaj esperantistoj. Tamen, dum ne klariĝas la situacio en ilia lando, laŭ mia opinio, ili devus aparte klopodi unuflanke disvastigi ankoraŭ plie Esperanton enlande, kaj aliflanke, plilarĝigi la komunikkanalojn kun eksterlandaj esperantistoj kaj transdoni ion de la korea kulturo al la internacilingva kulturo.

En ĉiuj aliaj landoj troviĝas nur aretoj da homoj, en kelkaj kazoj nur unu aŭ neniun, kies energio plej ofte ne sufiĉas por progresigi nian agadon. Ilin ni devas nepre

apogi de ekstero tiel per sendado de informmaterialo al adresoj indikitaj de ili, kiel per senpaga sendado de instrumaterialo kaj per ĉiuspeca alia bezonata helpo. Kompreneble, kaj ni kaj niaj aziaj geamikoj devus havi klarajn ideojn pri la argumentoj per kiuj eblas konvinki azianojn. Ankoraŭfoje ŝajnas al mi, ke la rolo ludota de la Internacia Lingvo kaj emfazinda fare de niaj informkampanjoj, povas klari nur post funda analizo de la lokaj lingvaj problemoj. Ne estas tie ĉi la loko por tia analizo, tamen, mi ne kapablas rezisti la tenton doni rapidegan aludon pri tiuj problemoj, ĉefe por neaziaj legantoj.

Pri la lingvaj problemoj en Azio

La legantoj de tiu ĉi revuo eble ion memoras pri la lingva stato de Afriko, tre supraĵe priskribita en mia antaŭa artikolo (v. nian revuon, decembro 1974, p. 203-205). Nu, oni povas diri, ke en la nun priparolata kontinento lingvaj problemoj prezentas sufiĉe malsaman bildon. Fakte, tie ĉi oni trovas kutime tre malnovajn kulturajn lingvojn, havantajn proprajn alfabeton, literaturon, historion. La ĉefa problemoj kuŝas en ilia modernigo kaj taŭgigo por nuntempaj teknikaj kaj sciencaj bezonoj. Kompreneble, ankaŭ tie ĉi oni trovas ekskoloniantojn, kiuj per la apogo de propraj sciencistoj kaj de komplezaj internaciaj organizaĵoj "pruvas", ke plej bone oni rezignu pri modernigo de la propra, favore al granda eŭropa, jam preta lingvo. Krome, aldoniĝas en pluraj ŝtatoj la problemoj de kunvivado de kelkaj apartaj etnoj, kaj, malkiel en Afriko, ofte temas pri etnoj kun propra literatura malnova lingvo, prilingvaj bataloj estas tre viva fenomeno, kiu verŝajne finiĝos nur kiam oni trovos solvon, kiu garantios ĉies rajtojn.

Kiam temas pri internaciaj rilatoj, la angla — kaj parte la franca — ĝuas pli grandan uzatecon.

Kompreneble, ili perdadis kaj pluperdadas jurajn poziciojn interne de unuopaj landoj (ekzemple: post la venko de la naciaj fortoj Radio Pnompeno anoncis la malpermeson pluuzi fremdajn lingvojn en Kamboĝo).

Konklude

Do, granda tasko estas antaŭ ni ĉiuj, kaj precipe antaŭ la aziaj esperantistoj. Temas, unue, pri studado de aziaj lingvoproblemoj kaj pri la identigo de maniero laŭ kiu Esperanto aplikeblas por parte venki tiujn problemojn. Due, sed samtempe, ni, kaj precipe la aziaj esperantistoj, devas vaste informadi pri la Internacia Lingvo. Multaj aziaj landoj ankoraŭ atendas sian Zamenhof, t.e. la dissendanton de 10 000 gramatikoj al ĉiuj eblaj interesiĝantoj.

Ĉu ni kapablos fronti la defion, kiun prezentas aziaj landoj? Mi kredas, ke ni kapablos. Ĉiukaze, UEA jam akceptis la defion kaj klopodas en la limoj de siaj malmultaj rimedoj ekagi subtene al la izolitaj aziaj esperantistoj. Ĉu la aziaj esperantistoj akceptos la saman defion? Mi esperas, ke ili akceptos ĝin.

Renato Corsetti

Kiel varbi la plej bonajn?

ANTAŬ kelkaj jaroj, en la kastelo Grésillon ni enketis inter 30 ĉeestantoj kiamaniere ili esperantistiĝis. Ni konstatis, ke tiuj, kiuj lernis la lingvon pro ĝenerala inklino al fremdaj lingvoj, estis tre malmultaj. Plej ofte temis pri esperantista tradicio en la familio de la enketitoj. Ŝajnas do, ke la plej bonaj lernantoj de fremdaj lingvoj en la lernejoj ne estas sisteme varbataj, kvankam ĝuste ili nature inklinas ankaŭ al Esperanto. Kiel do aliri varbcele tiujn lernantojn? Mi ne havas respondon, ĉar mi estas laboristo, sed eble instruistoj povus diri ion tiurilate.

André Antoni, Francujo

For titol-adoron!

PRO LA PLIVIGLIĜO de la "virinliberiga movado" ankaŭ inter esperantistoj oni foje diskutas pri la problemo "sinjorino — fraŭlino". Certe tiu distingo estas restaĵo de la malnova kutimo diskriminacia.

Sed, argumentadon pri tiu problemo ni lasu al konsciaj virinoj. Hodiaŭ mi volas rimarkigi, ke ankaŭ ĉe viroj aŭ pli precize: senrilate al la sekso) troviĝas simila problemo. Nome, apud la simpla "sinjoro" ni trovas serion da paradaj titoloj, tre ŝatataj de iuj vantamaj personoj: doktoro, profesoro, magistro, inĝeniero ktp. Ofte oni timas kulpi ofendon, nomante "sinjoro" portanton de tia "grava" titolo.

Por kio do utilas la titoloj? Supozeble iuj argumentos, ke per la titolo oni povu informiĝi kia persono estas la koncernato, kian profesion prestiĝon li ĝuas. Tamen, la titolo donas al ni nur svagan informon, ĝi esprimas nur parteton de la personeco. Kaj tute ne necesas, nek utilas, surporti la titolojn ĉie kaj ĉiam. Kiam ekz. profesoro pri fiziko parolas aŭ skribas pri la Esperanto-movado, tiam lia profesoreco povas havi nur tiom da prestiĝo, kiom la leonfelo portata de azeno. Gravas ne la titolo sed tio, kion li diras, kaj tio, kion li faris.

La plej evidenta malracieco de la titol-adoro konsistas en la malegaleco inter la profesioj, ĉar nur kelkaj profesioj posedas tiajn respektpostulajn titolojn. Ĉiu, kiu avidas kroni sian nomon per ia titolo, evidente celas per tio ŝajnigi sin pli supera ol la "ordinaraj homoj": Mi ne estas kamparano, nek barbiro nek kelnero, sed **profesoro, kiun oni devas respekti**. Tian sintenon ni ne povas nomi alie ol diskriminacio pri la profesioj.

Mi mem — por via informiĝo — estas doktoro pri scienco kaj universitata profesoro, sed verdire al mi ne plaĉas, ke oni min nomu per tiuj titoloj, precipe en la esperantistaj medioj. Ĉar, se oni vokas min "d-ro Konisi", mi sentas min kvazaŭ fremda, ia heterogena estaĵo inter la aliaj "s-roj", al kiuj mi volas resti egala.

Konisi Gaku, Japanio

Jarŝanĝaj festotagoj kaj universaleco

MI ADOPTAS KIEL MIAN la lastan frazon en la letero de s-ro Ŝemer (la marta numero, p.51) kaj ankaŭ mi instigas la redaktoron adapti la revuon al la opinioj kaj principoj de preskaŭ ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo, kaj sekve — li nepre daŭrigu bondeziri "feliĉajn jarŝanĝajn festotagojn" en ĉiuj estontaj januaraj numeroj de *Esperanto*.

Por via informo, s-ro Ŝemer, ĉi tie en Japanujo (ne-kristana, ne-eŭropa lando), ne nur la unua tago de januaro estas festotago, sed ankaŭ la dua kaj la tria (fakte, dum tiu periodo oni ne laboras ĉi tie proksimume sep tagojn). Dum tiu periodo estas kutimo sendi al kaj ricevi de aliaj aziaj landoj (ne-kristanaj, ne-eŭropaj) bondezirojn por la "jarŝanĝaj festotagoj". Tio por montri al vi, s-ro Ŝemer, ke la festado de jarŝanĝo tute ne rilatas al kristanismo, budhismo aŭ alia religio. La fakto estas, ke en la tuta mondo la unua tago de januaro estas akceptita kiel la komenco de nova jaro kaj ĉiu homo deziras, ke la jaro staranta antaŭ li estu pli bona ol la pasinta kaj tion li deziras ankaŭ por siaj proksimuloj kaj sekve ankaŭ por vi, s-ro Ŝemer.

Glauco G. Pompilio, Japanujo

Silentu pri ĝi!

EN "VI TROVOS", sur la kovrilpaĝo de la junia numero, rekomenciĝas disputado inter esperantistoj. Ĝi estas ege malplaĉa kaj multe ĝenas la propagandon. Simpatiantoj kaj novuloj, kiam ili ekscias, miregas pri tia utiligo de nia slogano "Unueco estas forto".

Lasu la "sarlandajn epigonojn" al iliaj fiagadoj. Fieraj, orgojlaj ili estas. Oni konas ilin. Mi opinias, ke ilia plej granda deziro estas, ke vi denove diskutadu kun ili; tiel ili povos atingi pli grandan amason da legantoj. Atentu, ili incitas vin! Se ne estos reago al ilia defio, kiuj scios kion ili pritraktas. Ne helpu ilin konatigante ilian sarlandan rendevuon de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto. Silentu pri ĝi.

Auguste Louis Mathis, Francio

Por ne misinformi la legantaron

EN NUMERO 833, p.85, de *Esperanto* aperis raporto, kiu enhavas kelkajn erarojn pri mi kaj pri mia laboro. Por ne misinformi la legantaron, bonvolu publikigi ĉi tiun korekton.

Mi estas nek doktoro, nek kunlaboranto de la Hungara Scienca Akademio, kiel asertas la raportinto. Mi estas sistem-programisto, kunlaboranto de la Sistem-teknika Kompanio Infelcor. La programada lingvo Progreso I, kiun mi verkis, taŭgas por prilabori tekstojn ne nur Esperantajn, sed ankaŭ alilingvajn. Dum mia prelego en Kumrovec, mi klopodis klare distingi la *programlingvon* (en kiu la programisto donas komandojn al la komputilo) kaj la *datumlingvon* (en kiu estas verkita la teksto prilaborota de la komputilo). Progreso I estas programlingvo, kiu baziĝas sur Esperanto.

Antal Münnich, Hungario

Japanaj verkoj pri Esperanto

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanio):

Han-taisei esuperanto undô si (*Historio de la kontraŭ-reĝima Esperanto-movado*), de Oosima Yosio kaj Miyamoto Masao. Tokio: Sanseidô, 1974. vii+355p. Ilus. 19cm. Broŝ. 1200 enoj.

Takaku takaku tôku no hô e (*Alten alten malproksimen*), de Itô Saburô. Redaktis Sibuya Teisuke, Haniya Yutaka kaj Moriya Norio. Tokio: Dohitu-sya, 1974. xi+600p. Ilus. 19cm. Bind. 3800 enoj.

Yamaga Taizi: hito to sono syôgai (*Jamaga Taiĉi: La homo kaj lia vivo*), de Mukai Kô. Tokio: Seigabô, 1974. 222p. 18cm. Broŝ. 600 enoj.

Vasili Eroŝenko sakuhinsyû (*Verkoj de Vasili Eroŝenko*). Redaktis Takasugi Itirô. Du volumoj. Tokio: Misuzu syobô, 1974. 521+413p. 19cm. Bind. 2500, resp. 2000 enoj.

Esceptante varbajn broŝurojn, ni malofte povas registri la aperon de nacilingvaj verkoj pri Esperanto. Tiom pli atentinde, ke sole dum la pasinta jaro en Japanio aperis kvar titoloj dediĉitaj al parte tre specialaj aspektoj de la Esperantaj movado kaj kulturo. Du el ili estis publikigitaj eĉ de renomaj eldonejoj.

La ĉefan mencion meritas la verko de Oosima kaj Miyamoto, kiu priskribas la aktivadon de personoj kombinintaj sian pledon por Esperanto kun protesto aŭ rezistado kontraŭ la japana politika sistemo, precipe la antaŭmilita. El ili, en eksterlando kredeble nur malmultaj nomoj estas konataj, ekz. la kuraĝa virino Hasegaŭa Teru, kiu sub plej nefavoraj kondiĉoj klopodis per Esperanto antaŭenpuŝi la interkompreniĝon de ĉinoj kaj japanoj, aŭ la maljuna Jui Ĉunoŝin, kies sinbruligo proteste kontraŭ la vjetnama milito skuis en 1967 la japanan publikon. Aliaj estas en Japanio tre bone konataj, kiel liberaluloj aŭ socialistoj, malpli kiel esperantistoj; skizante ilian ligiĝon kun Esperanto, la aŭtoroj impresas demonstras, kiomgrade la argumentado por la lingvo estis konsista ero en reformaj kaj revoluciaj strebadoj antaŭ kaj post la Unua Mondmilito. Ne hazarde, la unua organo de revoluciemaj literaturistoj adoptis en 1921 la esperantlingvan subtitolon *La Semanto*. Ni legas i.a. pri esperantistoj, kiuj batalis por la socia egalrajtigo de la japanaj "parioj", pri Fukuta Kunitaro, kiu en sia revuo *Verda Utopio* lerte kamuflis sian anarkisman idearon, pri Jamaguĉi Koŝizu, alia virino, kiu en Tajvano — kontraŭ la volo de la koloniaj aŭtoritatoj — disvastigis Esperanton inter la indiĝenoj, aŭ pri la latinigisto Saito Hidekacu, kies vivon frue estingis la sekvoj de karcera suferado. Ampleksa ĉapitro pri la proleta

Esperanto-movado komence de la 30'aj jaroj prilumas, aparte utile por japanaj legantoj, ankaŭ la internacian fonon, nome la persekutojn en aliaj landoj kaj la zig-zagojn en la internacia laborista Esperanto-movado.

La verko, cetere modele provizita per fontindikoj, ne pretendis doni plenan historion de la japana movado. Prioritata ŝajnas la deziro informi la publikon pri la imponaj tradicioj de tiu movado kaj samtempe inspiri al ĝiaj nunaj adeptoj, agantaj sub la pli favoraj kondiĉoj de la postmilita epoko, senton de fiero pro la aparteno al ĝi. En sia enkonduko la aŭtoroj mem koncedas, ke rezistado kontraŭ la "reĝimo" neniel estis la sola karakterizaĵo de la tiulanda movado — des malpli estas en la nuntempo, kiam gejunuloj malkovris la praktikan utilon de Esperanto, efektive parolas ĝin (kontraste al la famaj pioniroj de socialismo) kaj uzas ĝin dum vojaĝoj al eksterlando. La tempoj, evidente, ŝanĝiĝis. Signo de tio estas, interalie, ke Oosima kaj Miyamoto, kies pli frue verkitaj lernolibroj kaj vortaroj helpis progresigi la lingvon en ĉiuj tavoloj (senrigarde al ilia grado de kontraŭreĝimeco), estas rimarkinde liberaj de heroigemo aŭ stila patoso. Prave ili konstatas ankaŭ, ke la nunaj opoziciaj partioj, kvankam pli inklinaĵoj al Esperanto ol la registara, ĝis nun preterlasis formuli klaran lingvopolitikon, kiu povus ebligi al la esperantistoj koncentri siajn esperojn je la nunaj "kontraŭreĝimaj" fortoj. Pro tio, konkludas la aŭtoroj, ankaŭ por la Esperanto-movado validu la gvidlinio "La popolo sin apogu nur sur la propra forto". Aktuale, la esenca tasko estas reorganizi la iom disigitajn potencialojn de la japana movado kaj konstrui fortikan landan asocion. De tio UEA profitos same, kiel de la fina rekomendo en tiu ĉi grava libro, ke la japanaj esperantistoj, longe la solaj ekstereŭropaj atestantoj por nia universaleca pretendo, forlasu sian fiksiĝon al Eŭropo kaj pli aktive kunhelpu evoluigi la burĝonojn en Azio, Afriko kaj Latina Ameriko.

Pli detalan enkondukon en la vivon kaj agadon de tri personoj, al kiuj Oosima kaj Miyamoto dediĉis ĉapitrojn, donas la aliaj verkoj. Elstaran omaĝon ricevis, en formo de 600-paĝa libro, Ito Saburo (1902-1969), al eksterlandanoj konata ĉefe per sia poemkolekto *Verda Parnaso* (1932). Parton el tiuj poemoj, kun la propra traduko de Ito, entenas la nuna verko, sed precipe ĝia cetera enhavo — postlasitaj manuskriptoj, fragmentoj el leteroj, personaj rememoroj de granda nombro da amikoj kaj kunbatalintoj, eltiraĵoj el raportoj de la politika polico — montras, kiom larĝa efektive estis la kalibro de Ito. Li, nome, estis ne nur aŭtoro de ĉarmaj versoj, ne nur multjara esperantista aktivulo (kaj biografo de Zamenhof), sed ankaŭ, kiel dokumentas proksimume duono de la libro, prestiĝa aganto en la japanaj kamparana kaj prolet-kultura movadoj.

Kompare kun Ito, Jamaga Taiĉi (1892-1970), kies biografion verkis lia disĉiplo Mukai, estis iom soleca



Eroŝenko: Pli konata inter japanoj ol inter esperantistoj.

aganto. Lia idealo, kun kiu Esperanto eniris simbiozon en lia kazo, estis anarkismo, kaj al ambaŭ Jamaga sin disponigis tra sia tuta vivo, ekde kiam en 1914 li helpis al ĉinaj anarkistoj en la eldonado de la fama revuo *La Voĉo de la Popolo*. Li tradukis kaj eldonis plurfoje, en 1919 kun la rezulto de enkarcerigo, la verketon de Paul Berthelot, *La Evangelio de la Horo*, kaj en 1963 meksikaj anarkistoj publikigis hispanan tradukon el la verkoj de Laŭze, pretigitan surbaze de esperantigo el la ĉina originalo fare de Jamaga.

Fine, aperis japanlingva eldono de la verkoj de Vasili Eroŝenko (1890-1952), fakte parta reeldono de trivoluma kompleta verkaro aperinta en 1959. La nunaj du volumoj prezentas al la japana publiko la rakontojn kaj versojn de la rimarkinda figuro de nia Esperanta kulturo: Frue blindiĝinta, Eroŝenko pasigis plurajn jarojn en la orienta kaj suda Azio, verkis infanrakontojn en Esperanto kaj la japana lingvo, estis forpelita el Japanio en 1921 pro siaj kontaktoj kun maldekstruloj, instruis en 1922/23 Esperanton en la Pekina Universitato, amikiĝis kun Lusin (kiu tradukis ĉinen kelkajn fabelojn de Eroŝenko) kaj estis premiita dum la UK en Nürnberg pro sia bona prononco. Liaj verkoj certe ne povas pretendi altan literaturan nivelon, sed ŝajnas, ke ilia korvarmiga etoso renkontis ĝuste en la orienta Azio multe da simpatio. Ĉiukaze, la japanoj delonge akceptis lin kvazaŭ siaĵon, la ĉinoj same jam komence de la 20'aj jaroj eldonis liajn verkojn, aperis ankaŭ antologioj kaj biografio en la rusa kaj ukraina lingvoj. Sed — en Esperanto nur malmulto de Eroŝenko restas nun konsultebla*. Ĉu eblas esperi, ke la japanoj, kiuj gratulinde scias popularigi inter siaj samlandanoj la atingajojn de Esperanto, sentos stimulon rekonati la unikan poeton Eroŝenko ankaŭ internacie?

* Nun haveblaj ĉe la Libroservo de UEA estas (ankaŭ kompilitaj de Miyamoto): *Rakontoj de Eroŝenko* (Rakontoj de velkinta folio; La destinita vivi), 7,26 gld. *Facilaj legaĵoj* (de Eroŝenko: Unua paĝeto en mia lerneja vivo). 5,04 gld.

Grandparte tradicistila

Recenzas David K. Jordan (Usono):

Etnografiaj donitaĵoj, de Nguyen Tu Chi, Dang Nghiem Van, Lam Tam, Dang Nghiem Yan kaj Vuong Hoang Tuyen. Hanojo: Fremdlingva eldonejo, 1974. 351p. Ilus. 19cm. Broŝ.

De la loĝantaro de Nordvjetnamo* nur inter 85 kaj 87 procentoj estas *Viet*-anoj (t.e. de la gento *Viet*). La resto (eble proks. 2 961 000 personoj en 1970) apartenas al la t.n. "montaj gentoj" aŭ naciaj malplimultoj. El tiuj ĉi grupoj, la plej grandaj estas *Tay-Nung*-anoj (5,1%), *Muong*-anoj (2,6%), *Thai*-anoj (2,4%), *Mao*-anoj (1,4%) kaj *Zao*-anoj (1,7%). La recenzata libro estas enkonduko en la etnologion de ĉi tiuj (krom la *Tay-Nung*-anoj) kaj ankaŭ de la *Khum*-anoj (kies nombron oni ne raportas) kaj de "kelkaj etniaj grupoj ĝustatempe forsavitaj el ekstermiĝo ĉe la limoj de Nord-Okcidenta Zono". Kiel la plimulton de nordvjetnamaj libroj en Esperanto, ĉi tiujn studojn oni eldonis ankaŭ en aliaj lingvoj.

De la komenco la legonto devas kompreni, ke etnologio en Nordvjetnamo estas ne nur esploro kaj priskribo de la homaj moroj, kulturoj, sociaj strukturoj kaj folkloroj. Kontraŭe, la nordvjetnama etnologo devus esti, verŝajne, speco de misiisto por la registara politiko. En la enkonduko de la libro ni legas: "... oni vidas la laboron de la etnologo kuniĝi kun tiu de la politika kadro: la unua ja liveras eĉ, kaj ofte, bazajn donitaĵojn al la dua. Kvankam ankoraŭ juna, la nordvjetnama etnologio ... [estas] pli militanta aŭ eble pli utilcela, [kaj] ĝi prenas sur sin la taskon servi de proksime la socialisman revolucion en ĉiu el la etniaj grupoj konsistigantaj la vjetnaman nacion." (p.7)

(Kvankam oni nek rajtas nek povas malebligi al iu ajn la uzon de eldonitaj informoj, tamen, kontraste, usonaj etnologoj aktuale severe sin kritikas je precize la punkto pro kiu la vjetnama redaktoro fieras: eventuala politika [mis]uzo de etnologiaj esploroj por ŝanĝi [eventuale nevolontan] esploritan popolon. Jen eble mezurilo de la malsameco inter etnologio kiel studobjekto en la Okcidento kaj etnologio kiel ilo de politika manipulado en la manoj de komunistaj [kiel ofte de kristanaj] grupoj kaj registaroj. Oni ekpripensas la malkomforte proksiman ligon inter etnologio kaj kristanaj misiistoj en Filipinoj.) Parte per la laboroj de la etnologoj, do, "... la materia same kiel spirita vivo de ĉiu etnio jam prenas novan aspekton; multe da institucioj kaj tradicioj ligitaj kun eksmodaj sociaj reĝimoj [ĉu oni legu ĉi tie tutsimple 'nekomunistaj tradicioj' aŭ 'tradicioj malsimilaj al tiuj de la vjeta plimulto?'] estas forbalaitaj aŭ mem kadukiĝas por cedi lokon al novaj, pli raciaj, pli akordigeblaj kun la progreso kaj, — kial eviti la vorton — pli civilizitaj." (p.6) Jen supozeble la oficiala vidpunkto pri la graveco de etnografio. Kvankam tia ideologio sendube limigus

tiujn vjetnamajn etnologojn, kiuj ja sekvus ĝin, ŝajne (almenaŭ laŭ ĉi tiu libro) multaj sekvas ĝin nur perbuŝe, dum perage daŭre ili esploras kaj priskribas la kutimojn de sia lando grandparte en la tradicia maniero. La etnografiaj priskriboj de la libro estas do sufiĉe tradiciistilaj: fidindaj (aŭ ŝajne tiaj), sed kun speciala emfazo pri materiaj objektoj kaj pri postsignoj de pli fruaj kulturhistoriaj epokoj, kiu pensigas pri etnografiaj studoj de pli fruaj jardekoj. La priskriboj de la vivo de la vjetnamaj malplimultoj estas necese tre skizaj, sed ankaŭ ĉarmaj kaj interesaj al tiu kiu estas nescianto pri vjetnama etnologio, kaj tre bele verkitaj. Ili priskribas interese kaj tradiciajn vivkondiĉojn (se ne precize morojn) kaj ties lastajn ŝanĝojn.

Speciale frapas la recenzanton la sufiĉe glata transformiĝo de tradicia vivo al nuntempeco. Kvankam la integriĝo de la malplimultaj gentoj en la nuntempan vjetnaman ŝtaton ne estas sen problemoj (kiel la verkintoj konfesas sed ne priskribas), tamen tia integriĝo

estas malpli disrumpema al la tradicio ol eksterlandaj novaĵraportoj pri usona bombado kaj registara rigideco eksupozigus nin.

Ĉi tiu libro interese enkondukas la leganton, unue, al la ideologio de socia esploro en Vjetnamo (kio estas malkuraĝiga), due, al la tradiciaj vivstiloj kaj folkloroj de la malplimultoj de Nordvjetnamo (kio estas interese), kaj, trie, al la lasta kaj nuntempa transformado de tiaj societoj (kio estas neevitebla). "Tradicia" novedzino de la gento *Muong* diris neologisme kaj signife, okaze de sia edziniĝa festo: "Estu bonveninta, kamarado etnografo!" (p.12)

* *PIV*, *Poŝatlaso* kaj *Mondmapo* de IOE uzas la formon Vjetnamo. Nordvjetnamanoj mem emas uzi la formon Vjetnamio. En la Jarlibro oni trovas la formon Vjetnamujo (Suda). Kredeble, kelkuloj antaŭ la militfino diferencigis la Nordon de la Sudo per uzo de -io kaj -ujo, sed tio estas malcerta. Ĉiuokaze, mi sekvas ĉi tie la *PIV*-an stilon, kiu ŝajnas esti plej norma kaj plej simila al la uzo de la vjetnama lingvo mem.

Enciklopedio

En ĉi tiu rubriko aperas tekstoj verkitaj por la nova (preparata) eldono de "Enciklopedio de Esperanto"

Pazigrafioj

PAZIGRAFIOJ (el la greka: "skribo por ĉiuj") estas inventitaj signaroj (ekz. ciferoj, literoj, piktogramoj, ideogramoj aŭ aliaj signoj), kiuj kiel "universalaj skriboj" laŭ la inventintoj devus ebligi esprimon de ĉiuj nocioj, sendepende de la unuopaj lingvoj.

La ideo pri kreo de pazigrafioj estas kunligita al la kreo de sekretaj lingvoj, universalaj alfabetoj kaj steno-grafioj, kiel ili abunde estas inventitaj en la 16a ĝis 18a jarcentoj. Kun la evoluo de la nacioj kaj ties lingvoj en Eŭropo la latina perdis sian rolon kiel la internacia lingvo de la scienco. Tio plisentigis la neceson de nova ilo por la internacia lingva komunikado. La scio pri la ĉina lingvo aŭ la egiptaj hieroglifoj grave influis la diversajn provojn krei pazigrafiojn.

La vorto "pazigrafio" supozeble estas uzita unuafoje en la verkoj de Vater (1795)¹ kaj de Maimeux (1797)². La unuaj pazigrafiaj sistemoj (ofte miksitaj kun sekretaj aŭ okultismaj signaroj) estas inventitaj de J. Tritheim (1518)³, J. Becher (1661)⁴, A. Kirchner (1663)⁵ kaj de Leibniz (1666), kiu en *Ars combinatoria* kiel unua diskutis iom pli vaste la principojn de apriora pazigrafio, kiu ankaŭ estis transformebla en paroleblan lingvon⁶. Konataj projektoj ekzistas ankaŭ de G. Dalgarno (1661)⁷ kune kun filozofia apriora lingvo, J. Wilkins (1668)⁸ kune kun apriora lingvo, C. Wolke (1797)⁹, F. Niethammer (1808)¹⁰, A. Bachmaier (1868)¹¹, J. Damm (1876)¹², k.a.

Eĉ en la 19a kaj 20a jarcentoj, kiam oni jam plene konsciis pri la neceso ne de skriba sed de skriba kaj parola interkomunikilo, la provoj krei pazigrafion ne ĉesas. Inter la plej konataj novaj pazigrafioj troviĝas "Safo" (1951, A. Eckardt)¹³, "Semantography" (1949, C. K. Bliss)¹⁴, "Pazigrafio" (1955, K. Obermeier)¹⁵, kaj eĉ la "Écriture universelle" de la fama franca satira desegnisto Jean Effel (1968)¹⁶.

La ĝis la nuntempo pli ol 100 pazigrafiojn oni povas klasifi

- laŭ la semantikaj konstruprincipoj de la nocioj, ĉu sendepende aŭ depende de naciaj noci-modeloj, en 1. aprioraj aŭ 2. aposterioraj pazigrafioj;
- laŭ la uzitaj skribsimboloj aŭ teknikoj 1. ciferaĵ, 2. literaj pazigrafioj, 3. piktografioj/ideografioj,
- krome ekzistas "vortar-teknikaj" pazigrafioj.

Aprioraj pazigrafioj havas kiel kondiĉon de sia noci-kombinado la klasifon de la tuta tiam konata scio en kategorioj, subkategorioj, klasoj, subklasoj ktp. Uzante literojn (konsonanto-vokalo-kombinojn) por signi la unuopajn kategoriojn tiuj pazigrafioj fariĝis paroleblaj kaj sekve aprioraj (aŭ filozofiaj) planlingvoj. Similan projekton (literan pazigrafion) ellaboris Georg Dalgarno (1661), kiu ĉiujn siatempe al li konatajn ideojn dividis en 17 ĉefklasojn, tiujn li signis per 17 latinaj kaj grekaj literoj. Ekzemple:

A - objektoj	H - substancoj	Ka - oficaj rilatoj
K - fenomenoj politikaj		Kn - justicaj rilatoj
S - fenomenoj sociaj		Ke - afero juĝenda

Tiu sistemo ne allasas adaptiĝon al la plivastiĝantaj ekkonoj pri la mondo fare de la homo, ĉar tio ŝanĝus

la tutan klasifon, do la tutan pazigrafion. La arbitreco de la klasifo evidentiĝas jam en la fakto, ke K-aĵoj ja devus esti subklaso de S-aĵoj ktp. Alia speco de litera apriora pazigrafio ankaŭ estas tiu de Karl Obermeier (1955), kiu signis ĉiujn vortfamiliojn per litergrupoj, ekzemple:

J...G - io rilate parolon JAG - parolo
JBG - interkonsenti JAG. - interparolo
JCG - alparoli JCG. - alparolo
JHG - priparoli JLG - kunparoli ktp.

Aposterioraj pazigrafioj konstruas siajn nociojn laŭ la modeloj de (plej ofte eŭropaj) lingvaj noci-kombinoj. La **piktografiode** J. Z. Näther (1805)¹⁷ havas bildigitajn ligojn al la realo:


brulanta domo letero aŭ komuniko skriba krajono okulo

— = atesto pri incendio.

Krom la piktogramoj Näther uzis helpsignojn por pronomoj, gramatikaj interrilatoj ktp.

Pleje ellaborita verŝajne estas la piktografio "Safo" (1951) de la konata germana orientaziologo André Eckardt. "Safo" konsistas el 180 bazaj signoj, el kiuj munteblas kombinitaj nocioj:

| 7 7 F 9 Y ↑
estaĵo homo viro virino infano naskiĝo domo

79 - knabo F9 - knabino 79F - familio

↑↑ - vilaĝo ↑↑↑ - urbo

Fr 1 f 9 8 → FK rr ±

Safo estas tre grava por persona korespondado. Donante al ĉiu baza signo elparoleblan literkombinon Eckardt faris "Safo" parolebla.

Al "Safo" tre similas "Semantography" de C.K. Bliss (1949):

λ1 2 3 λ2
Mi skribas leteron (al) vi.

Ankaŭ de Jean Effel la "Ecriture universelle" (1968) sekvas samajn principojn:

⇒ - Mi pensas, sekve mi ekzistas.

Tiuj bildskriboj estas pli-malpli ligitaj al la homa imagokapablo aŭ sekvas, jam je pli abstrakta nivelo, la konstruprincipojn de ideografioj, kie la originaj bildoj prezentantaj la realon ne plu estas rekoneblaj. Fakte temas plej ofte pri mikso inter piktografioj kaj ideografioj, kiuj ankaŭ utiligis literojn, ciferojn kaj aliajn signojn kaj simbolojn.

Kelkfoje la pazigrafiistoj celis realigi per siaj projektoj certan filozofion. Per la vera prezento de la enhavo de la nocioj C.K. Bliss ekzemple volis malebligi men-

sogojn, nebuligon de konceptoj ktp. kaj vidis, kiel la adeptoj de "General semantics", la kaŭzon de konfliktoj inter la homoj en la neadekvata signigo kaj esprimo de la ideoj.

J.J. Becher (1661) konstruis ciferan pazigrafion, numerigante ĉiujn vortojn enestantajn en latina vortaro: bibere (trinki) - 939 viper (serpento) - 9200 biblia (biblio) - 940 vir (viro) - 9201

La 6 latinaj kazoj estis signitaj per la ciferoj 1 ĝis 6: 2.9201 - genitivo de viro. Aplikante tiun teknikon ankaŭ al alilingvaj vortaroj kaj uzante konformajn indeksojn, Becher proponis **vortar-teknikan pazigrafion** (aŭ pli bone: traduk-mekanismon), similan kian ankaŭ proponis C. Wolke (1797). Por ĉiu lingvo la vortaro devus enteni ĉiujn vortojn kun ĉiuj diversaj gramatikaj formoj, kiuj siavice ricevas ĉiujn numeron. Por internacie korespondi oni devas noti la respektivajn numerojn, kiuj estus samaj en ĉiuj vortaroj por la difinitaj vortoj kaj ties formoj.

Similan proceduron proponis ankaŭ A. Renzi (1840)¹⁸, kiu aldone utiligis helpsignojn.

Kritiko de la pazigrafioj

Principe bone ellaborita aposteriora pazigrafio povas funkcii, sed la unuopaj sistemoj estas aŭ tre komplikaj kaj tiam preskaŭ ne manipuleblaj aŭ supraĵe konstruitaj kaj sekve ne ebligantaj interkomunikadon.

La enkapigo de pazigrafio estas tre komplika, ĉar eĉ en tiuj bone ellaboritaj sistemoj kiel "Safo" la nocioj ne estas facile "demunteblaj" el la signo-kombinoj.

La evoluo de la homa scio, semantikaj fenomenoj kiel la signiŝanĝoj, polisemio ktp. por aprioraj pazigrafioj prezentas nevenkeblajn, por aposterioraj tamen ekstreme malfacilajn problemojn.

Piktogramoj kaj aliaj signoj ludas sendube ĉiam pli grandan rolon en la internacia trafiko kaj en aliaj branĉoj de la homa vivo. Sed el tio konstrui komunikadan sistemon kiel universalan skribon estas anakronismo, ĉar la alfabetoj pruviĝis kiel taŭgaj kaj pli raciaj ol hieroglifoj aŭ piktografioj.

Krome, nur skriba internacia komunikado tute ne sufiĉas, necesas ankaŭ la parola.

Vera raciigo de internacia lingva komunikado nur eblas per planlingvo taŭga por skriba kaj parola uzoj.

Ĉefa bibliografio:

a) Superrigardaj verkoj:

- Drezen, E.K. *Historio de la mondolingvo*, 2a Esperanta eldono, EKRELO, Leipzig, 1931
- Stojan, P.E. *Bibliografio de internacia lingvo*, UEA, Genève, 1929, fotopreso 1973 (Georg Olms Verlag, Hildesheim - New York)
- *The International Language Review*, Denver (USA), 1956 - 1968
- *Zeitschrift für allgemeine Schriftkunde*, 1956 - 1960 (eldonita de Ewald Lotzing, Kiel, Fred Blaul-eldonejo, Fürth)

b) Unuopaj projektoj (respondantaj al la ciferindikoj en la teksto):

1) Vater, Johan Severin *La Pasigraphie*, Wien, 1795 (Stojan 799) 2) De Maimieux, Joseph *Pasigraphie ou premiers éléments du nouvel art-science d'écrire et d'imprimer en une langue. . .*, Paris, 1797, Bureau de Pasigraphie (Stojan 5696) 3) Trithemius, Johann *Polygraphiae*, 6 vol. Oppenheimer 1518 (Stojan 15) 4) Becher, Joh. J. *Character pro notitia linguarum universalis inventum steganographicum hactenus inauditum*, Frankfurti, 1661 (Stojan 39) 5) Kircher, Athanasius *Polygraphia nova et universalis ex combinatoria arte detecta*, Roma, 1663 (Stojan 35) 6) vgl. Trendelenburg, Adolf *Über Leibnizens Entwurf einer allgemeinen Charakteristik*, Berlin, 1856, *Aus den Abhandlungen der Königlichen Akademie der Wissenschaften zu Berlin 1856* (Stojan 72, kiu la antaŭnomon erare indikas) 7) Dalgarno, Georg *Ars Signorum, vulgo character universalis et lingua philosophica qua poterunt homines diversissimorum idiomatum, etc.* London, 1661 (Stojan 86) 8) Wilkins, John *An essay towards a real character, and a philosophical language*, London, 1668 (Stojan 87) 9) Wolke, C.H. *Erklärung, wie die wechselseitige Gedankenmitteilung allen kultivierten Völkern des Erdkreises oder die Pasigraphie möglich und ausüblich sei etc.*, Dessau, 1797 (Stojan 805) 10) Niethammer, Friedrich Immanuel *Über Pasigraphie*

und Ideographik, Nürnberg, 1808 (Stojan 822) 11) Bachmaier, Anton *Pasigraphisches Wörterbuch deutsch-englisch-französisch*, Augsburg, 1868 (Stojan 844) 12) Damm, Janne *Praktische Pasigraphie oder die Kunst, mit allen Nationen der Erde zu korrespondieren*, Leipzig, 1876 (Stojan 850) 13) Eckardt, André *Die neue Weltsinnschrift Safo, Einführung, 7. umgearbeitete Auflage*, Starnberg/See, 1962; amplekse ankaŭ en *Der Volksstenograph, Internsystemale Umschlagzeitung für Kurzschrift und Verwandtes*, Hrsg. E. Lotzing, Kiel, Jarkolektoj 1954, 1955, artikoloj de d-ro Rossmann kaj prof. A. Eckardt. 14) Bliss, C.K. *International Semantography*, Sidney, 1949 15) Obermaier, Karl *Kurze Anleitung zur praktischen Verwendung der Pasigraphie, Schrift für alle*, Salzburg-Mönchsberg, 1955, (vervielf. beim Verfasser) 16) Effel, Jean *Avant-projet pour une écriture universelle*, Paris, 1968 17) Näther, J.Z. *Versuch einer ganz neuen Erfindung von Pasigraphie oder die Kunst zu schreiben und zu drücken, dass es von allen Nationen der ganzen Welt in allen Sprachen ebenso leicht gelesen werden kann als die Zahlencharakter 1, 2, 3, in Form einer Sprachlehre etc.* Görlitz, 1805 (Stojan 5702) 18) Renzi, A. *Le polyglotte improvisé ou l'art d'écrire les langues sans les apprendre avec 3000 verbes conjugués*, Paris, 1840 (Stojan 835).

Detlev Blanke

Rememorigoj por konsidero

DOKTORO ZAMENHOF verkis interalie du poemojn: "La Espero" kaj "La Vojo". En la unua li diris: "... kaj rapide kreskas la afero"; en la dua li diris: "... ni paŝon post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro." En la unua poemo d-ro Zamenhof estas idealisto, en la dua li estas realisto.

Mi havas la saman sperton. Kiam mi komencis mian propagandan laboron, mi tuŝis la idealisman flankon. La reago estis preskaŭ ĉiam la sama, nome: a) la komplemento "tre interesa", b) la konsilo: "oni devas enkonduki Esperanton en la lernejojn". Pro tiu konsilo mi turnis min al la tiama skabeno por la instruado en Amsterdam, s-ro De Miranda. Lia respondo estis: "La homoj ĉiam pensas, ke skabeno povas agi laŭ propra plaĉo. Tio estas absoluta miskompreno. Mi povas proponi la enkondukon nur post kiam montriĝis, ke Esperanto jam tiom enpenetris en la internacian vivon, ke la instruado estas necesa. Tiu maturigo ne estas mia tasko. Tiu laboro estas via." Similan respondon mi poste ricevis de la sekretario de la Ministerio pri instruado en Hago. Simile parolis la alta protektanto de la 55a UK en Vieno, la tiama prezidanto de Aŭstrujo: "Vi fidu pli al propra forto."

En mia profesia laboro kiel turist-gvidisto kaj interpretisto mi havis la okazon aŭskulti la ĝeneralan opinion pri Esperanto de homoj el multaj landoj kaj preskaŭ ĉiuj tavoloj de la socio. La ĝenerala opinio estas favora al Esperanto. Principe oni estas preta subskribi la "promeson", kiun d-ro Zamenhof enmetis en la unuan libron kaj kiu tekstas jene: "Mi, subskribinto, promesas ellerni la proponitan de doktoro Esperanto lingvon internacian, se estos montrite ke dek milionoj da personoj donas publike tian saman promeson." Ni do vidas, ke d-ro Zamenhof jam montris al ni la vojon. Nia devizo do estu: **Ne prediku, sed apliku.**

Resume ni povas fari la jenan konkludon: Esperanto troviĝas inter la du polusoj: a) **la registaroj**, kiuj povas oficiale rekoni kaj enkonduki Esperanton en la lernejojn **nur post kiam** sufiĉe da homoj estos lernintaj la lingvon; b) **la homoj**, kiuj lernos Esperanton **nur post kiam** la lingvo estos sufiĉe vaste aplikata en la internacia vivo. Ni do turnu nin al la instancoj, kiuj okupas lokon sur ĉi tiu tereno, kun la peto: "Bonvolu mencii la komunikojn por la publiko, klientoj aŭ gastoj en Esperanto apud la kutimaj lingvoj". Ni povas mencii sufiĉe da instancoj, kiuj jam plenumas ĉi tiun geston de internacia ĝentileco.

Por detalaj informoj pri la sperto en tiu direkto dum la pasintaj 40 jaroj restas je via dispono

Hans Bakker,
delegito de UEA, Amsterdam

Francio

- Dum dek tagoj, fine de majo, la esperantista grupo de Hennebont prezentis ekspozicion en la mezepoka konstruaĵo "Pordo-Bro-Erek" pri la sportoj en la mondo, por kiu la materialon kolektis la esperantista grupo en Angers. En la lasta ekspozicia tago, organizantoj akceptis esperantistojn el Plancoët (v. la foton).

Jugoslavio

- Post plurjara neaktivado de Makedonia Esperanto-Ligo kun la sidejo en Skopje, lastatempe estas entreprenitaj seriozaj preparoj por ĝia restarigo. Meze de majo ĉi-jare, en la makedona urbo Prilep kolektiĝis 32 delegitoj de 9 esperantistaj grupoj en ĉi tiu parto de Jugoslavio por refondi Makedonian Esperanto-Ligon. La sidejo de la refondita organizaĵo estos en Prilep, kiu havas tre aktivan lokan grupon. Estas menciinde, ke inter la gastoj ĉe la refondiĝo troviĝis kelkaj tre elstaraj figuroj de la makedonia kultura kaj socia vivo.
- Unu el la plej grandaj jugoslaviaj entreprenoj, kiu produktas pneŭmatikojn kaj ŝuojn kaj havas 16 000 laboristojn, "Borovo" decidis ĉi-jare finance subteni la esperantistan bultenon *Voĉo*, kiu estas la sola regula periodaĵo de jugoslaviaj esperantistoj post la provizora malapero de *La Suda Stelo*.

Aŭstrio

- Kiel sekvo de tuta serio de similaj aranĝoj en la lastaj du jaroj, la 7an de junio 1975, Aŭstria Esperantista Federacio kaj Societo por Internaciaj Kontaktoj — Esperanto-amikoj



kun la Aŭstra-Bulgara Societo organizis komunan aranĝon "Aŭstrio — Bulgario". La ĝenerala sekretario de la Aŭstra-Bulgara Societo, d-ro N. Nedev, kiu parolis en Esperanto, salutante direktis sin ankaŭ al reprezentanto de UNIDO (faka instanco de UN), kiu ĉeestis la aranĝon.

Brazilo

- En la antaŭnelonge akceptita laborplano de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, landa asocio de UEA en Brazilo, troviĝas ankaŭ ero, kiu anoncas, ke KKE intencas kandidatiĝi kiel organizanto de la 65a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1980. Tio estus la unua UK en Sud-Ameriko.

Meksikio

- En nia aprila numero aperis anonceto, kiu invitis skribi al meksika ĵurnalisto opinianta, ke Esperanto estas "forgesita afero". Rezulte de la anonceto, la ĵurnalisto, d-ro Mir, ricevis pli ol 400 leterojn el 20 landoj. Nun, tute entuziasma pri la "forgesita afero", d-ro Mir aperigis 6-kolumnan

artikolon pri laleterlavango kaj planas aperigi aliajn, ĉi-foje favorajn artikolojn pri Esperanto.

Sudafriko


- Fondita komence de ĉi tiu jaro, Pretoria Esperanto-Grupo jam bone agas en la sudafrika ĉefurbo. Krom pluraj artikoloj aperintaj en kelkaj afrikansaj kaj anglalingvaj ĵurnaloj, la grupo sukcesis aranĝi ankaŭ malgrandan ekspozicion en la urba biblioteko. Ĝi daŭris de la 19a de majo ĝis la 14a de junio. Tre verŝajne baldaŭ sekvos ankaŭ Esperanto-kurso en Pretorio.

Italio

- Fine de majo la urba pupteatro el Nis (Jugoslavio) gastis en la norda Italio kaj San Marino. Dum tiu unusemajna turneo la artistoj ludis por la plej etaj italoj la pupteatraĵon *Lepura lernejo* en la Internacia Lingvo. Montriĝis, ke la junaj spektantoj bone komprenis la teatraĵon malgraŭ tio, ke ili ne lernis Esperanton. La pupteatro plurfoje gajnis premiojn ĉe la zagreba festivalo.

Belgio

- La 20an de septembro 1975, okazos en Herstal apud Lieĝo la inaŭguro de "Ponto Esperanto (sur la foto), kiu super la rivero Mozo kaj Albert-Kanalo ligas la komunumojn Herstal kaj Wandre. Okaze de tiu inaŭguro, la membroj de Belga Esperantista Federacio, SAT-Amikaro kaj MEM en la regiono de Lieĝo organizas dutagan renkontiĝon kun alloga programo. Informojn bv. peti ĉe: s-ro A. Heuschen, rue de Hermée 155, B-4400 Herstal, Belgio.



Foiroj

- Triesta Esperanto-Asocio, kiu en septembro ĉi-jare gastigas la 46an Italian Kongreson de Esperanto, havis dum la antaŭnelonge okazinta "Triesta Internacia Specimenfoiro" apartan standon (v. la foton). Tiu iniciato montriĝis tre sukcesa, ĉar la bone aranĝita stando logis tutan amason da homoj, ĉefe junaj. Estis disdonitaj miloj da informiloj kaj disvendiĝis ĉiuj disponeblaj lernolibroj.

Esperantologio

- Komence de 1976, la Universitato ELTE en Budapeŝto eldonos volumon sub la titolo *Esperantologiaj studoj*. Ĝi enhavos kontribuojn de diversnaciaj lingvistoj pri grafiko, fonetiko, fonemiko, semantiko, morfemiko, sintagmatiko kaj generatransforma sintakso de Esperanto. La volumon, kiu aperos nur en la eldonkvanto de 500 ekzempleroj, eblas antaŭmendi (prezo: 1,- us. dolaro) ĉe: Esperanto-fako de la Katedro pri ĝenerala kaj aplikita lingvistiko, Universitato ELTE-BTK, Budapest V, Pesti B. 1-3, Hungario.

Teatro

- Pola Esperanto-Teatro kun la geaktoroj Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski el Varsovio pasigis unu monaton en FR Germanio, laŭ invito de la eldonejo Ludwig Pickel. Inter la 15a de majo kaj la 15a de junio ili prezentis la teatraĵon *Proksima nekonato* de la pola verkisto A. Scibor-Rylski, kiun ili ludis ankaŭ dum la pasintjaraj UK kaj IJK. La prezentoj okazis en Oberkirch (dum la Germana Esperanto-Kongreso) kaj en Nürnberg, München, Augsburg, Stuttgart, Bonn kaj Paderborn.

Ekonomio

- En la kvarvoluma verko *Essays in economic theory, application, and practice*, kiu pasintjare aperis — plejparte korelingve — en Seulo, honore al la ekonomiisto Hochin Choi, troviĝas ankaŭ 24-paĝa scienca kontribuado, originale verkita en Esperanto: "Politikekonomio kaj la polucio en Koreujo". La aŭtoro estas Gim Sam-su, profesoro ĉe la Virina Universitato Suk-Mjong en Seulo.



Rotarianoj

- Dum la 59a Brita Kongreso de Esperanto, fine de majo ĉi-jare, okazis ankaŭ la jarkunveno de la Rotario-Asocio de Esperantistoj (Brita Sekcio). S-ro Norman Williams estis elektita honora prezidanto, kaj s-ro G. Leon-Smith elektiĝis kiel prezidanto. Rotarianoj planis kunveni ankaŭ dum la 60a Universala Kongreso en Kopenhago.

Literaturo

- En la internacia literatura konkurso "Larius", organizata de la Turisma Asocio en Como, Italio, ĉi-jare por la unua fojo konkursis ankaŭ Esperantaj poetoj. La juĝkomisiono, konsistanta el elstaraj figuroj en la Esperanta kulturo (ges-roj: Azzi, Bernard, Conterno, E. Lapenna kaj Rossetti), la unuajn tri premiojn aljuĝis al Karolo Piĉ (Ĉeĥoslovakio), Nicolino Rossi (Italio) kaj Vittorio Dall'Acqua (Italio).

Revuoj

- Laŭ iuj informoj atingintaj nin, ŝajnas, ke la itala literatura revuo *Literatura foiro* definitive transprenas la malnovan kaj renoman periodaĵon *Norda prismo*, kiu dum la lastaj jaroj spertis diversajn malfacilaĵojn. Espereble, en unu el niaj venontaj numeroj ni povos pli amplekse trakti tiun novaĵon.

Filatelio

- Ĉe la poŝtaj aŭtoritatoj en Israelo oni faras klopodojn eldonigi poŝtmarkon kun portreto de d-ro Zamenhof, lige al la 60a datreveno de lia

traduko de la Sankta Biblio. Estas projektata ankaŭ alia Esperanta poŝtmarko dediĉota ĝenerale al la Internacia Lingvo. Definitivan decidon pri la eldono verŝajne helpus pliaj proponsubtenoj direkteblaj al: Israela Filatela Servo, str. Jeruŝalaim 12, Tel Aviv.


Persone

Tacumi

- Japania Esperanto-Instituto faris ĉi-jare la decidon estonte sendadi ankaŭ junularan reprezentanton al la internaciaj Esperanto-kongresoj. El inter pluraj kandidatoj por la unua premia vojaĝo (ĉar JEI subvencias ĝin) la plej bona montriĝis s-ro Joŝiki Tacumi, 24-jara oficisto, kiu per siaj scioj pri la lingvo kaj Movado sukcesis venki la aliajn kandidatojn. Sekve, ĉi-jare li partoprenas la 31an Internacian Junularan Kongreson de TEJO kaj la 60an Universalan Kongreson de Esperanto.

Sunardo

- La indonezia diplomato, s-ro Eriko Sunardo, kiu sendube estas unu el la plej kompetentaj esperantistoj en la sudorienta Azio, cetere ankaŭ dumviva membro de UEA, fine de junio ĉi-jare estis nomita unua sekretario de la Indonezia Ambasadato en Vieno. Dum la pasinta jaro, s-ro Sunardo servis kiel sekretario de la Internacia Kontrol-Komisiono en la Suda Vjetnamio.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1975, p. 64-65. Mallongigoj:

I = informoj, P = parolado, K = kurso.

Esperanto-Fako, CH-3000 Bern
15, Svislando.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90 (6135 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I. P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz). I. P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 KHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30m, 25m, 19m. I.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Ital.
20.05-20.30 Sofio, 5061m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.82m (15140 kHz), 19.60m (15305 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio,

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). P. (Ĉiun kvaran sinsekvan mardon: la 22an de julio, la 19an de aŭgusto ktp.).

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
20.45-21.00 Sabadell, 203m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I. K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz). P. (d-ro A. Baur).

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m, 25m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155

kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz); 2) dum la svedlingva programo marde de la 15.00 ĝis la 15.30 per ondoj 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz); 3) dum la danlingva programo dimanĉe de la 20.00 ĝis la 20.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (tamen aŭdebla en la apudaj landlimaj regionoj), Gdańsk (mod. frekv.), Muritiba, Sabadell.

b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo.

Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sud-orienta Azio).

ĉ) Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (25.60m, 25.27m, 19.82m, 19.60m, 16.83m, 13.94m).

Tio ĉi estas nur ĝenerala skizo pri la aŭdebleco, kiu dependas ankaŭ de la modelo de la ricevilo, de la atmosferaj kondiĉoj kaj aliaj lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

N-ro 491, 1975 06 30

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

DANL: Karina Kehlet. JAP: Toru Yamasaki.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

SVED: 98 Å. Ericson; 99 I. Johansson; 100 C. Olsson. BELG: 101 A. Degryse. SVED: 102 E. Schuldenfrei; 103 Erik Åkerlund. US: 104 Doris Vallon; 105 Janos Stitz; 106 Julie Regal; 107 Cecilia Peterson. SVED: 108 Amy Nilsson. NORV: 109 M. Landmark. NED: 110 A.M. E. v. Walsem-Schutte. BRAZ: 111 D. Pereira de Souza. FINN: 112 J. Vilkki. NORV: 113 O. Reiersøl; 114 A. Armanis. US: 115 Jack Lesh; 116 Mark Starr. BRAZ: 117 Carlos H. Dionisio. BELG: 118 P. Peeraerts. MEKS: 119 H. Vazquez Briones. SVED: 120 Åke Blomberg. NED: 121 A.C.E. Childs-Mee; 122 L. Mee. KAN: 123 Dorothy M. Hawley. US: 124 T.A. Goldman; 125 D.M. Keedy; 126 Mary Murray; 127 W. Campbell Nelson; 128 W.P. Simpson; 129 Paul Solin; 130 Milton O. Brown. BRIT: 131 E.B. Knight. FRANC: 132 F. Charlet. AŬSTR: 133 Gottfried Hofstätter. JAP: 134 Hideo Shinoda. HISP: 135 Josep Castelltort Riba. US: 136 S. Chobanoff; 137 George Lockhart. KAN: 138 Jonathan Pool. JAP: 139 Seiiči Kato. NED: A.J.M. de Jager.

DONACIOJ 1975 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Usono: Here-
daĵo Simpkins 563,90. Sumo ĝis-
nuna 3 953,40.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: Kurt Weil 30,—; Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 30,—; Instituto Hodler 2 300,—. Usono: John Futran 45,56. Sumo ĝisnuna 3 861,29.

CED: Belgio: Germain Pirlot 20,54. Sumo ĝisnuna 94,35.

ĜENERALA KASO: Anonime 84,81. Belgio: Edmond Lödör 39,57; Emile Gillet 66,18; Francio: Jean Amouroux 11,66; Esperanto-klubo St. Etienne 60,30. FR Germanio: Ludwig Th. Robel 24,—; Fritz Schottenhammer 51,20; Bruno Vogelmann 1 536,10. Hispanio: Salvador Arnella 19,57; Centro de Esperanto Sabadell 237,22. Kanado: Dorothy

M. Hawley 370,04. Nederlando: Nimega Esperanto-klubo 100,—. Nov-Zelando: J. Siddall 24,90. Svedio: Marta Björk 12,39; Erik Carlén 8,—. Usono: Jack Lesh 12,57; Cecilia Peterson 45,24; Salvatore Raia 14,31; Mark Starr 147,62. Sumo ĝisnuna 5 323,87.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO

21 F. Barata; 22 M. Cañellas Arse-
gol; 23 S. Martinez Garcia; 24 S. Ribes Garolera; 25 F. Soley Sallares; 26 Julius Balbin; 27 Humphrey R. Tonkin.

Al ĉiuj tre koran dankon. UEA

UNU PLIA ALIĜINTA KAJ DU PLIAJ KUNLABORANTAJ FAKAJ ASOCIOJ EN UEA

Per skriba voĉdono (48 voĉoj kontraŭ neniuj), la Komitato de UEA ĵus akceptis la aliĝpeton de Universala

Medicina Esperanto-Asocio. UMEA nun rajtas nomi komitatanon A de UEA konforme al la art. 25 de la Statuto. Fondita (kiel TEKA) jam en la jaro 1908, UMEA nun havas 350 membrojn.

Samtempe la Komitato aprobis kontraktojn pri kunlaboro, konforme al la art. 15 kaj 16 de la Statuto, kun Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (IUEF) kaj kun Bahaa Esperanto-Ligo. La aprobo de la kontrakto kun IUEF estis unuanima, dum tiu kun BEL estis aprobita per 44 voĉoj kontraŭ 1, kun 3 sindetenoj.

Rezulte de tiuj decidoj, la nombroj de la aliĝintaj fakaj kaj kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj altiĝis respektive al 3 kaj 18.

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ ELEKTOTAJ

En la tagordo de la Komitato de UEA por Kopenhago troviĝas proponoj pri nomigo de sep novaj honoraj membroj de UEA — el sep diversaj landoj. En la nuna momento la nombro de la honoraj membroj estas 12. La sep novajn honorajn membrojn proponis la Estraro de UEA.

OKAZOS ĜENERALA VOĈDONO PRI LA STATUTO DE UEA

Per skriba voĉdono (46 voĉoj kontraŭ 3), la Komitato de UEA ĵus decidis, ke okazu ĝenerala voĉdono por plilongigi la validecon de la nuna Statuto de UEA. Laŭ la nun valida Statuto, "Universala Esperanto-Asocio estas fondita por la daŭro de periodo de 29 jaroj, kalkulita de la 28-a de aprilo 1947 kaj sekve finiĝonta je la 27-a de aprilo 1976". Por ke la Asocio jure plue ekzistu post tiu dato, necesas ŝanĝi la Statuton en tiu punkto kaj — ĉar UEA havas nederlandan juran personecon — peti la reĝan aprobon por tiu ŝanĝo. Temas pri pluvalidigo por plia periodo de 29 jaroj. (Laŭ la nederlanda juro, tio estas la maksimuma daŭro de asocio, ĝis nova plilongigo.)

Por statutŝanĝo necesas t.n. ĝenerala voĉdono, priskribita en la art. 42-43 de la Statuto. En ĝenerala voĉdono ĉiu aliĝinta landa asocio havas tiom da voĉoj, kiom da membroj. Nur en tiuj landoj, kie ne ekzistas aliĝinta

landa asocio, la membroj voĉdonas individue.

Jam en la marta numero de ĉi tiu revuo, sub la titolo "Jura kontinueco de UEA", s-ro U.J. Moritz en la nomo de la Komisiono pri la Statuto klarigis kelkajn ideojn de la Komisiono pri aliaj plibonigoj en la Statuto. La membroj estis alvokitaj esprimi ankaŭ siajn ideojn tiuteme, kaj dum la 60a UK en Kopenhago okazos aparta publika kunsido pri la Statuto kun la sama celo pridiskuti eblajn plibonigojn. Montrigis, tamen, ke ne estas eble atendi la finon de tiaspecaj diskutoj, sed, ke unue necesas oficialigi la plilongigon de la jura ekzisto de la Asocio per la menciita malgranda modifo en la art. 1. Post tio estos eble — sen prema tempolimo — proponi, voĉdoni kaj aprobigi laŭbezone aliajn ŝanĝojn.

La ĝenerala voĉdono pri la art. 1 okazos antaŭ la fino de aŭgusto ĉi-jare, pere de cirkulero al la landaj asocioj kaj rekte al la individuaj membroj en la landoj sen aliĝintaj asocioj.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Gekursanoj kaj anoj de nova Esperanto-grupo, diversaĝaj sed plejparte junaj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Esperanto-Grupo ĉe Dopolaro PT. I-66100 Chieti, Italujo.

La Biblio, kiel rigardi ĝin, kiel kompreni ĝin? Klarigoj en interesa libreto por 2 resp. kup. Al nepagipovaj senpage. Esperanto-Misio, S-694 02 Hallsberg, Svedio.

Membroj de kluboj de "Virinoj en komercaj kaj/aŭ profesiaj okupoj" (Professional and Business Women's Clubs) estas petataj skribi al f-ino M. Wadhams, 11 St Peter Street, Rochester, Kent, Anglujo.

Lernejoj Esperanto-grupoj (15 jaroj) serĉas grupkontakton eksterlande. Skribu al: s-ro Nutton, South Craven School, Crosshills, Keighley, Anglujo.

24-jara veterinara studento de la 5a kurso serĉas kontaktojn kun okcidenteŭropaj veterinaroj kaj studentoj. Edward Kozyra, Pl. Grunwaldski 65 DS "Centaur", PL-50-366 Wrocław, Pollando.

100-persona grupo de mezlernejoj el la naskiĝloko de Zamenhof volas korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo. Esperanto-Klubo Z.H.P., ul. Marchlewskiego 3/1, PL-15-042 Białystok, Pollando.

Veraj suferantoj je migreno (hemikranio) estas petataj skribi al s-ino I. McGuigan, 18 Dudley Road, Hastings, Sussex, Anglujo.

Atentu esperantistoj, ĉie en la mondo. Gotenburgo estas la dua urbo en Svedio post Stokholmo, la ĉefurbo. Ni deziras per Esperanto efektiviĝi ĝemeliĝon kun la dua urbo en ĉiu lando. Skribu kaj petu detalojn: INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Interŝanĝas poŝtmarkojn, peco por peco: Murat, P.O.Box 32, Victoria 3149 Aŭstralio. Minimume 50 per letero.

Vojaĝante al Ĉeĥoslovakio, Grekujo aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederl.

NI AFABLE PETAS la membrojn laŭeble ne skribi al la Centra Oficejo dum la monatoj julio kaj aŭgusto, se ne temas pri urĝaj mendoj aŭ demandoj. En tiu periodo pluraj oficistoj aŭ libertempas aŭ havas urĝajn kongresajn taskojn.




En aŭgusto vendiĝos la mila ekzemplero: ĝi estos senpaga!

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

**Perfekta desinfektado de ĉambro-aero!
Bona profilakto kontraŭ infektoj!**



Ĉi tiu aparato vaporigas Evola-T, aerdesinfektan likvan rimedon. Nur 1 gramo hore sufiĉas por absolute desinfecti spacon de 100 kubaj metroj. Kun elektra lampo de 15 vattoj ĝi sufiĉas por 300 kubaj metroj, ekz. klasoĉambro; kun lampo de 25 vattoj ĝi sufiĉas por spaco ĝis 800 kubaj metroj. Infektoj de gripo, kataro kaj ĉiuj infek-


taj malsanoj estas malebligataj. Rekomendinda por ĉiuj ĉambroj kaj salonoj kun publika trafiko: lernejoj, hejmoj, atendejoj, oficejoj, laborejoj, fabrikoj, hospitaloj; efika ankaŭ en fungokeloj, panfabrikoj, kontraŭ putrobakterioj kaj ŝimo. Kontrolita de la universitatoj en Munkeno kaj Kopenhago. Vendopermeso de la Ministerio por la sano en FR Germanio kaj en multaj aliaj landoj.

**Chemische Fabrik Bruno Vogelmann
D-718 Crailsheim**

DELEGITOJ!

Ĉu la detaloj pri vi en la Jarlibro 1975 estas ĝustaj?

Eventualaj ŝanĝoj, aldonoj aŭ korektoj devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue ĝis la 1-a de oktobro 1975 por certigi aperigon en la nova listo.




**LA AKTUALECO
DE LA JARLIBRO
DEPENDAS
DE ĈIU UNUOPA
DELEGITO
— DO,
ANKAŭ
DE VI MEM!**

LIBROJ EL KAJ PRI FRISLANDO EN ESPERANTO



FRISAJ RAKONTOJ

f 6,= (+ sendokosto)



P. Wijbenga

DORSE KONTRAŬ LA MURO

f 9.90 (+ sendokosto)



Nynke van Hichtum

LA DEKOPO DE AFKE

Ĵus aperis: la fama libro
por 8-80 jaraj homoj!

f 9,= (+ sendokosto)


Mendoj:

**Libro-servoj kaj D. Visser
Engelsestraat 20 - Leeuwarden
Nederlando**

Csepel ofertas



Sekve de rapidega evoluo de la tekniko — kiel en la landoj de alte evoluinta industrio en la tuta mondo — ankaŭ en Hungario iĝis neevitebla pligrandigo de la produktado, distribuo kaj ekonomia uzo de la elektra kurento. Por utiligi la elektran energion kun malgranda perdo — do ekonomie — **Csepeli Traszformátorgyár** (Transformator-fabriko de Csepel) donas helpon; ĝi ja estas heredanto kaj evoluiganto de la tradicioj kaj rimarkindaj rezultoj de la hungara transformator-fabrikado, kontinue renovigata ekde 1885.



La fabriko kapablas kontentigi la plej specialajn postulojn per eminentaj produktaĵoj pro la evoluigo de la plej novaj teknologiaj procedoj kaj pro la rapida industria ekuzo. Ĝiaj produktaĵoj funkcias ekster la terenoj de la hungara industrio, ekonomio kaj elektriza programo en la distribuaj retoj de Mez-Eŭropo, Afriko kaj Sud-Ameriko je plena kontento de la aĉetantoj kaj de fakuloj. Ĉe la kreo de la produktserioj estis priatentitaj la postuloj je la malalta perdonivelo, malhelpo de rektkonekto, solideco je tensio-impulso, je mezur- kaj pez-malpliigo. Por realigi tion estas aplikitaj malvarme laminatitaj ferlamenoj, moderna fabrikado de ferkerno, vakuo-tekniko kaj cel-maŝinoj.

Al ĝiaj produktaĵoj apartenas la transformatoroj de seka kaj olea malvarmigo, betonarmaturaj bremsbobenoj — limigantaj rektkonekton —, mezuraj kaj specialaj transformatoroj, mintransformatoroj kaj substacioj. La oleo-transformatoroj pretiĝas principe en du alternativoj: kun kupra kaj alumina bobenado ĝis rendimento 6400 kilovattoj kaj maksimume 35 kilovoltoj nominala retotensio. La transformatoroj de kupro-bobenadoj en tiaj variaĵoj, kiuj konformas al la bezonoj de seka kaj tropika klimatoj.

La sekaj transformatoroj pretiĝas ankaŭ en alumina kaj kupra bobenadoj inter redimentlimoj de 10–1000 KVA, kun maksimume 10 KV nominala retotensio. La transformatoroj de seka kaj olea malvarmigado havas elstare bonajn parametrojn, kiuj certigas al la entrepreno multajn mendojn por tendroj en la monda merkato.

Krom la oleaj transformatoroj la fabriko pretigas ankaŭ kurentlimigajn bremsbobenojn — de betonarmaturaj kaj 3 fazoj — ĝis rendimento 50–400 KVA, kun nominala tensio 25 KV. La bremsbobenoj estas fabrikitaj ankaŭ kun alumina kaj kupra bobenadoj.

La produktoskalon vastigas diversaj tipoj de specifaj transformatoroj, mezurtransformatoroj, specialaj mintransformatoroj kaj substacioj.

Krom la supre menciitaj, la prepariteco kaj kapacito de la entrepreno prezentas eblecojn interne de supraj redimentlimoj kontentigi ankaŭ specialajn postulaĵojn.

Informado:

**Csepel
Vas- és
Fémművek
Értékesítési
Főosztály**

H-1751 BUDAPEST, Pf. 93.

Eksportisto: TRANSELEKTRO.